

474157/50 (1981)
Esperanto
BULGARA

1 • 1981

ESPERANTISTO



ORGANO DE BULGARA ESPERANTISTA ASOCIO





Ĝelernantoj de IX klaso de la Politeknika Gimnazio „Hristo Botev“ — u. Vraca, membroj de la unua lernanta E-societo en Bulgario „Verda Raketo“, abonis al „BE“ po du jarkolektojn

Redakta komitato:

Dončo ĤITROV (ĉefredaktoro), Vasil BOROVIANSKI, Dimitar DENĈEV, Evgeni GEORGIEV (sekretario), Dimitar ĤAĜIEV, Krástju KARUCIN, Ĥaim LEVI (viceĉefredaktoro), Flori NIKOLOV.

Administranto: Metodi GAREV
Korektis: Evgeni GEORGIEV

Revuo „Bulgara Esperantisto“ — fondita en 1919 j.
Eldonkvanto 6 100.

Adreso de la redakcio:
„BULGARA ESPERANTISTO“

Bul. Ĥristo Botev 97, P. K. 66
1303 Sofio, Bulgario 1000 Sofio
tel. 32-40-68, 31-00-29

Sur la kovrilpaĝo:

«Ĥano Asparuh transiras
Danubon kun sia armeo»

(Fragmento el la pentraĵo de Penčo Kulekov)

ENHAVO

• • • Alvoko al la bulgara popolo	1
Dimitro Ĥaĝiev. La kulturo — sendito de la paco	3
• • • Ne lasu esti mortigita Kim De-Jung	4
• • • Nova ĉefredaktoro de „Bulgara Esperantisto“	4
• • • Elstara bulgara esperantisto — jubileo	5
• • • Zamenhof — celebros	6
L. Trifonĉovski. Plenkusido de la DE en V. Tarnovo	7
• • • Kunvenoj — koncertoj en Botevgrad kaj Sliven	7
D-ro Nikola Tanev. Esperanto en la filatelo	7
• • • Verda tabulo	8
Emil Ĉirpanski. Bona propagando — bonaj rezultoj	8
Nikola Najdenov. Vigla agado de „Lumo“	8
• • • Pasporta Servo — rekorde ampleksa	8
Evgeni Georgiev. Entuziasmo	9
Bojan Karastojanov. Laborista gratulo	9
L. Trifonĉovski. Nacia studenta konferenco en V. Tarnovo	10
Stefka Ŝumkova. Pupoj parolas en Esperanto	10
K. Mateeva. Nobla faro — sekvinda	10
• • • Bulgaraĵ kantistoj — esperantistoj gast-ludis eksterlande	11
Prof. Stojan Petrov. Lumo el la jarcentoj	12
Nikola Aleksiev. Jubileo de soveta veterano	13
Adolf Holzhaus. Aleksandro Zilbernik	14
• • • Por via lingva perfektigo: Bulgara popola fabelo	15
Ivan Rudnikov. La revoj homaj	16
Dimitro Denĉev. Interkonatiga	16
Ljuba Bojagieva. Altnivela poemkolekto	III
Kiril Kalĉev. Komencu per hardigado	IV

NIAJ PERANTOJ

ALFABETE LAŬ LANDOJ

Britio, Covenham Louth, Lincs, LN 11 OPF
Laycroft Main Road, s-ro Paul Hewitt
Ĉeĥoslovakio, Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilska 10, 110 00 Praha 1.
Ĉeĥoslovakio, 040 01 Košice, Ŝmerova 35/1, Esperantisto Slovaka, Daniel Papak
Francio, F-54510 Tomblaine, B. P. 23, ĝirkonto 771.77 R, NANCY
s-ro Roger Degrelle
Jarabono 20. — f. i.
Finnlando, PL 221, SF 70 101, Kuopio 10, Finna Esperanto-librejo
Germana Demokratia Respubliko, DDR 108 Berlin, Charlottenstr. 60, Ĉentra Laborrondo Esperanto
Germana Fed. Respubliko, Esperanto-eldonejo Palatina kklr. Iggebach, Schlossgasse 30, poŝtekkonto n-ro 1658 48-678 ISHFN D-6731 Elmstein

Jarabono: 8 gmk.
Hispanio, Gijon Asturias, Ramon y Cial, 44-3° — Izqda, s-ro Adonis Gonzales Meana
Jarabono: 300 ptoj
Hungario, „Budapeŝta Informilo“, p. k. 153, H-1443 Budapest
Kubo, Ciego de Avila, apartado 223, Pedro P. Lamas Diaz
Nov-Zelando, N. Z. Esperanto Assn. book dept. 180 Onepu RD, Lyall Bay Wellington.
Portugallio, Portugala Esperanto-Asocio, R. DR. Joao Couto, 6 R/C. A Lisboa-4
Jarabono: 260 eks.
Sovet-Unio, 200016 Tallinn, Estonio, do vostrebovanija Johannes Palu
Jarabono: 5 rubloj
Vjetnamio, Hanoi, 222 D&I Can,
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio



LA ETERNE VERDA ARBO DE BULGARIO

Dum 1981 j., kun konscio pri inda kontribuo en la historio de la homa civilizo la bulgara popolo festos la 1300-an datrevenon ekde la fondiĝo de sia ŝtato. Dum tiuj ŝtormoplenaj dektri jarcentoj, sep el kiuj pasis sub fremda jugo kaj nur ses en nacia libereco, la bulgara popolo postvivis ŝanĝojn de la sorto kaj minacojn, konservis sian spiriton, lingvon, literaturon kaj kulturon, evoluis kaj eniris la novan, la vere oran jarcenton de sia nuntempa socialisma realaĵo.

TODOR JIVKOV

Prezidanto de Ŝtata Soveto de PR Bulgario

AL V O K O

AL LA BULGARA POPOLO OKAZE DE LA 1300-A DATREVENO EKDE LA FONDIĜO DE LA BULGARA ŜTATO

*Civitaninoj kaj civitanoj de Popola Respubliko Bulgario,
Kamaradinoj kaj kamaradoj,
Fratoj kaj fratinoj,*

Ni staras antaŭ la sojlo de granda tutpopola festo — la 1300-jara jubileo de la bulgara ŝtato — unu el la plej malnovaj ŝtatoj en Eŭropo, estiginta sur la heredaĵo de antikva civilizo sur nia teritorio, trairinta longan vojon de evoluo kaj atinginta la plej altajn suprojn de la nuntempa progreso — la venkon de la socialisma sociordo en Popola Respubliko Bulgario.

Miltricent jaroj de neforgesebla pasinteco! Tridek ses el ili estas jaroj de la plej granda revolucio en la multjarcenta historio de nia popolo, kies naskiĝdato — la 9a de septembro 1944 — staras apud 681 j. ne nur sur la blazono de la bulgara ŝtato, sed estas ankaŭ en la memoro kaj koro de ĉiu bulgara patrioto. Dum tiuj 36 jaroj ni konkeris la plej altan supron en nia evoluo, atingis pli ol dum jarcentoj antaŭe. El tiu supro hodiaŭ ni ĉirkaŭrigardas la pasintecon, la vojon trairitan dum dektri jarcentoj, la nuntempon kaj estontecon de nia heroo kaj laborama popolo.

Nuntempa socialisma Bulgario estas enkarigo de ĉio valora kaj daŭra, kreita dum nia multjarcenta kaj glora historio, epokfara akiraĵo de la laborista klaso kaj ĉiuj laboruloj. Dum tri jardekoj kaj duono Bulgario nereko-

neble aliformiĝis, fariĝis moderna industri-agrikultura ŝtato kun alta materiala kaj spirita kulturo.

Heredanto de riĉaj miljaraj tradicioj, la socialisma kulturo havas eksterordinarajn atingojn. Rapide disvolviĝas la scienco kaj ĉiam pli transformiĝas en potencon produktadforton. Supreniras kaj profunde reorganiziĝas la popola klerigo. Elkreskis multnombra taĉmento de nova socialisma intelektularo.

Neniam Bulgario ĝuis tiom multe da amikoj en ĉiuj anguloj de la planedo. Neniam ĝia pozicio sur la Balkanoj, en Eŭropo kaj la mondo estis tiel stabila kaj aŭtoritata. Ĝia principa, pacama kaj konstruiva politiko estas grava faktoro de paco kaj sekureco en nia geografia regiono.

Niajn akiraĵojn ni ŝuldas al la frata kunlaboro kaj reciproka helpo kun Sovetunio kaj la aliaj socialismaj landoj, al la solidareco kaj subteno de la komunista kaj laborista movado, al ĉiuj progresemaj fortoj en la mondo.

Ni rajte fieras, ke Bulgario estas patrolando de la slava skribo kaj kulturo, ke ni estas posteuloj kaj heredantoj de fratoj Kiril kaj Metodi kaj de ties lernantoj...

En la epoko de Renesanco firmiĝas la bulgara nacio, disvastiĝas je larĝa fronto la batalo por nacia sendependeco, progresas la arto, kulturo kaj klerigo. En tiu ĉi glora supreniro de tutpopola memkonsciigo Bulgario naskis kaj edukis la gigantojn de nia naci-demokratia

revolucio Vasil Levski kaj Hristo Botev, kiuj viciĝas inter la plej elstaraj tutmondaj ideologoj kaj batalantoj por libereco kaj homaj rajtoj, por sociala progreso.

La libereco, sopirita kaj revita, venis! Venis kun la rusaj admirindaj herooj, fortikigis ankoraŭfoje nian fratecon sur montosupro Sipka kaj apud urbo Pleven. La bulgara ŝtato renaskiĝis por nova vivo.

Nur dektri jarojn post la liberigo el otomana jugo Dimitro Blagoev — la patriarko de la socialismo en Bulgario, la plej eminenta marksisto sur la Balkanoj fine de XIX kaj komence de XX jc. — kaj liaj kunbatalantoj metis sur montosupro Buzluga la fundamentojn de la revolucio kaj marksisma partio en nia lando.

Tiu partio gvidis la batalon de laboristoj kaj kamparanoj kontraŭ la faŝismo, organizis kaj gvidis la heroan popolan armitan ribelon en septembro 1923 j. kaj la venkan Naŭseptembran socialisman revolucion.

Tiu partio edukis agantojn kaj gvidantojn, kiuj postlasis neforviŝeblan spuron en la historio de la lando, en la internacia kaj la laborista movado.

Inter ili altas la majesta figuro de la gvidanto kaj instruanto de la Bulgara Komunista Partio kaj la popolo — Georgi Dimitrov. En la historio de la tutmonda revolucia movado brilas kun neestingebla lumo la epokfara heroofo dum la juĝproceso en Lejpcigo, kie li donis la unuan ruinigan moralan kaj politikan baton al la faŝismo, defendis kaj priglorigis la bulgaran popolon kaj ties heroan laboristan klason. Lia nomo estas nedisiĝebla ligita kun la jardekaj bataloj de la Bulgara Komunista Partio, kun la Septembra Kontraŭfaŝisma Ribelo en 1923 j., kun la formiĝo de la sava Patrolanda Fronto, kun la venko de la Naŭseptembra Socialisma Revolucio, kun la estigo de la popoldemokratia ŝtato kaj la komenco de socialisma konstruado ĉe ni.

En nia nova historio restos por ĉiam enskribita per oraj literoj la armita batalo de la popolo kontraŭ la faŝismo kaj kapitalismo dum la pezaj jaroj de la Dua Mondmilito. Dekmiloj de ties fidelaj filinoj kaj filoj — partizanoj kaj partizankaŝantoj, politikaj malliberuloj kaj koncentrejanoj, sen indulgi sian vivon sin jetis en mortobatalon kontraŭ la malamiko por libereco kaj socialismo. Historia akiraĵo de la Bulgara Komunista Partio estas tio, ke ĝi unuigis ĉirkaŭ la programo de la Patrolanda

Fronto la progresemajn kontraŭfaŝismajn fortojn, preparis kaj gvidis la venkan armitan ribelon je la 9a de septembro 1944. En la fajro de la kontraŭfaŝisma bataloformiĝis kaj hardiĝis la frata alianco de la Bulgara Komunista Partio kaj la Bulgara Agrara Popola Unuiĝo, kiu alianco ankau nuntempe estas krea faktoro en nia socialisma evoluo.

Karaj samlandanoj,

La tutpopola celebrado de la 1300-jariĝo de la bulgara ŝtato okazos en la jaro de la Dekdua Kongreso de la Bulgara Komunista Partio kaj ties 90-jara jubileo, koincidas kun la komenco de oka kvinjara plano. Tio atribuas ankoraŭ pli grandan signifon kaj ankoraŭ pli profundan sencon de la jubileo, alvokas kaj devigas ĉiun el ni al entuziasma kaj frukto-dona laboro. La inda renkonto de la jubileo postulas kompletan mobilizon de la fortoj de la tuta popolo, de ĉiuj laborkolektivoj, de ĉiu bulgara civitano!

Ni alvokas ĉiujn socipolitikajn organizaĵojn pli persiste kaj efike labori por fortikigi ĉe la civitanoj de Popola Respubliko Bulgario la konscion pri nacia honoro kaj indeco, la fieron, ke ili naskiĝis, vivas kaj kreas en socialisma Bulgario.

Filoj kaj filinoj de la patrolando, dissemiĝintaj tra ĉiuj kontinentoj, en kies koroj pulsas patriota bulgara sango! Memoru kaj amu vian patrujon! Fieru pri via deveno, pri la heroo historia de via popolo, pri via bulgara nomo! Amu la renaskiĝintan socialisman Bulgaron, subtenu ĝian ĉiujflankan progreson!

Karaj samlandanoj,

Eĉ ne unu jarcenton la bulgara popolo renkontis kun tiel klara estonteco. Proksimiĝante al la sojlo de la XXI jc. ĝi estas plena je nemezurebla kredo, ke la estontaj jaroj de socialisma Bulgario estos jaroj de ankoraŭ pli granda supreniro en la ekonomio, en la kulturo, en la tuta spirita vivo de nia socio, ke ĉiuj ni, la bulgaraj civitanoj, mobilizos fortojn, sciojn kaj volon por novaj jaroj, por nova supreniro al la fina celo — komunismo.

Vivu eterne en la jarcentoj nia antikva kaj ĉiam juna, nia kara patrolando, nia belega Popola Respubliko Bulgario!

Gloron al la bulgara popolo — popolo-heroo, popolo-kreanto!

- Vivu la amikeco inter la popoloj!

Vivu la paco!

Centra Komitato de Bulgara Komunista Partio

Ŝtata Soveto de Popola Respubliko

Bulgario

Ministra Konsilio de Popola Respubliko Bulgario

Gvida Konsilantaro de Bulgara Agrara Popola Unuiĝo

Nacia Konsilantaro de Patrolanda Fronto

Centra Konsilantaro de Bulgaraj Sindikatoj

Centra Komitato de Dimitrova Komso-molo

Centra Komitato de la Batalantoj kontraŭ la Faŝismo kaj Kapitalismo.

LA KULTURO — SENDITO DE LA PACO, INTERNACIA KOMPRENIGO KAJ HUMANISMO

INTERNACIA RENKONTIGO-DIALOGO EN SOFIO

Nur du monatojn post la rimarkindaj internaciaj forumoj — la Parlamento de la Popoloj por Paco kaj la Tria Internacia Renkontigo de Verkistoj, Sofio denove fariĝis centro de monda atento. Je la 2—6 de decembro 1980 en ĝi okazis Internacia Renkontigo-Dialogo pri la temo „La rolo de la kulturo por la evoluo de la homo kaj la socio“.

Eble tiu ĉi renkontigo estas la unua en la mondo tiaspeca evento en la sfero de la kulturo. Al ĝi estis montrita granda intereso. Pri tio atestas la respektinda nombro de la landoj kaj la nivelo de la partoprenintoj: 180 reprezentantoj el 65 landoj de Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko, inter kiuj 25 ministroj kaj 26 vicministroj de la kulturo, 43 famaj sciencistoj kaj gvidantoj de kulturaj institucioj kiel David Willson, direktoro de la Brita Muzeo, Paul Perrot, vicedirektoro de Smithsona Instituto en Vaŝingtono k.a. Tio ĉi ne estas hazarda. Bulgario dum la lastaj jaroj akiris la mondan reputacion de lando kun konsekvenca pacama politiko, kun aktiva internacia kultura agado, direktita al proksimiĝo kaj reciproka konatiĝo de la popoloj. Kiel emfazis en sia parolado la hinda profesoro Lokeŝ Candra, en la fino de la XX jc. la antikva kaj juna Bulgario, lulilo de la slavaj skribo kaj kulturo, denove prenas la iniciaton por la kultura renesanco de la homaro.

Usona modelo de kulturo


La neceso de la Renkontigo estis elvokita de la komunaj zorgoj pri konservo kaj plua evoluigo de la homa civilizacio, de la komuna espero, ke la kultura intersaĝo inter la landoj fortigas la fidon kaj altigas la spiritan riĉecon de ĉiu popolo.

En la diskutado pri la temo de la Renkontigo-Dialogo partoprenis 79 reprezentantoj el diversaj landoj.

Cefan paroladon faris la prezidantino de la Komitato pri Kulturo de Popola Respubliko Bulgario Ljudmila Jivkova pri la temo: „La misio de la kulturo — respondeco antaŭ la estonteco“. La oratorino substrekiis, ke „hodiaŭ en la malfacilaj tagoj de mondiaj perturboj, de homa malunuigo kaj konfrontado, de agoj kaj provoj de la monda reakciularo retroirigi la planedon al la epoko de la „malvarma milito“, kiam la progresema homaro, pensuloj kaj inventistoj, publikaj agantoj kaj kreantoj, sobre pensantaj politikistoj kaj statistikoj, patroj kaj patrinoj, sciencistoj kaj pedagogoj mobilizas siajn fortojn kaj starigas barojn sur la vojon de la milito kaj la detruo — la kulturo kiel faktoro por evoluigo kaj perfektigo de la homo kaj la socio fariĝas misio kun granda respondeco antaŭ la estonteco“. K-dino Jivkova detale pritraktis la fenomenon kulturo, montrante ĝian multaspektecon. Si indikis, ke la kreskanta rolo de la kulturo en la socialisma socio estas la plej karakteriza fenomeno en la kultura disvolvigo de Bulgario en la nuna etapo.

Salutante la konferencon je la nomo de la ĝenerala direktoro de UNESKO Amadu Mah-tar M'Bou, la vicĝenerala direktoro Makaminan Makagnarsar aprezis alte la klopodojn de PR Bulgario por evoluigo de la internacia kunlaborado kaj esprimis la dankon de UNESKO pro tio. Li emfazis la rolon de la kulturo por evoluigo de sento de trankvileco kaj optimismo, por venko de la distancoj inter la homoj.

La diskutado pri la temoj „La kulturo — universala faktoro por la evoluigo de la homo kaj la socio“, „Kulturo—socio—ŝtato“ kaj „La kulturo — faktoro por konatiĝo kaj interkompreniĝo inter la popoloj“ ebligis al la delegitoj de 65 landoj dividi la spertojn de siaj ŝtatoj kaj serĉi komunajn vojojn por altigo de la spiritalaj valoroj en la nuntempa socio. Ili esprimis sian konvinkon, ke la kulturo kaj la kultura kunlaboro estas la plej bona vojo al la paco kaj progreso de la homaro. Ĉiuj parolintoj alte aprezis la iniciaton de Bulgario, kiu respondas al la deziro de la popoloj vivi en paco. Ili emfazis, ke la kulturo devas plenumi sian rolon por konservo de la civilizacio.



Inter la pridiskutitaj demandoj estis ankaŭ tiu pri la influo de la sociaj kondiĉoj sur la disvolvigo de la kulturo. Estis klarigitaj la funkcioj de la revolucia kulturo en la batalo por socia progreso.

La oratoroj el la socialismaj landoj substreki la signifon de la krea en tiuj landoj kulturo — nacia laŭ formo kaj socialisma laŭ enhavo. Ili parolis pri la rezultoj de la tutmonda partopreno en la kreado de spiritaj valoroj, emfazante, ke la ĉefa celo de la kulturo estas la eduko de ĉiufanke kaj harmonie disvolviginta personeco.

Estas pridiskutitaj ankaŭ la demandoj pri la konservo de la kultura heredaĵo de la homaro kaj pri la rolo de UNESKO tiurilate. La rolo de tiu ĉi organizado en la aktivigo de la internacia kultura kunlaborado estas ege grava. Oni esprimis opinion, ke la nekono de la kulturoj de aliaj popoloj estas unu el la kaŭzoj por apero de kontraŭdiroj rilate iujn problemojn, facile solveblaj pere de spiritaj kontaktoj.

Krome estas pritrakitaj aspektoj de la reciproka influo kaj penetrado de la kulturoj, samkiel la rolo de la kulturo kiel eduka faktoro kaj unuiga elemento de la nacio. La delegitoj de Kubo kaj Afganiŝtano priskribis la detruan rolon de la koloniismo, reakciaro kaj kontraŭevolucio.

La konferencanoj parolis ankaŭ pri la internacia kultura kunlaborado kiel stimulo por vastigo de la kontaktoj en la aliaj sferoj de la vivo, por la serenigo de la internacia

politika klimato, por estigo de justa internacia ekonomia ordo.

Estis montrita granda intereso pri la kompleksa programo de tutpopola estetika edukado kaj pri ĉiufanke kaj la harmonia disvolvigo de la personeco, pri la sukcesa aplikado de la ŝtata-publika principo de gvidado de la kulturo en nia lando, pri la programo pri celebrado de la 13-jarcenta jubileo de la bulgara ŝtato kaj pri aliaj iniciatoj en la kultura sfero. Multaj oratoroj substreki la kreskantan aŭtoritaton de la Infan-Asembleo „Standardo de la Paco“ kaj subtenis ĝian devizon: „Unueco, Kreiveco, Beleco“. Rememorigante la Infan-Asembleon kaj aliajn aŭtoritatajn internaciajn manifestadojn, organizitajn en nia lando, oni substreki, ke Bulgario rajte akiris la renomon de monda kultura centro.

Emfazante la aktualecon kaj la utilecon de la bulgara iniciato por kunvoko de la Renkontigo, multaj oratoroj faris proponon, ke ĝi fariĝu tradicia kaj estu kunvokata periode. Responde al tio k-dino. L. Jivkova deklaris, ke PR Bulgario akceptas la respondecen post du aŭ tri jaroj, ĉe komuna konsento, denove organizi similan renkontigon.

Komuna estas la opinio, ke la Renkontigo-Dialogo en Sofio pasis en atmosfero de interkompreniĝo kaj bonintenco. Ĝi sendube kontribuos al plia enprofundiĝo en la esencon kaj la rolon de la kulturo por disvolvigo kaj perfektigo de homo kaj socio, al konfirmo de la paca kunekzistado inter la popoloj sur la tero.

NE LASU ESTI MORTIGITA KIM DE-JUNG!

La milita tribunalo de Korea Respubliko (Suda Koreo) kondamnis al morto Kim De-Jung — ekskandidato por prezidanto de la respubliko.

La juĝo estas nur provo trompi la mondon kaj kvazaŭle mortigi tiun demokraton kaj kontraŭulon de la milita faŝismo, reganta en tiu lando.

Ni apelacias al ĉiuj demokratoj kaj honestaj homoj en la mondo: en via lando faru tuj ĉion eblan por savi Kim De-Jung! La faŝistoj urĝas la ekzekuton!

NOVA ĈEFREDAKTORO DE «BULGARA ESPERANTISTO

La Centra Estraro de BEA oficigis ekde la 1a de januaro 1981 j. k-don Donĉo Hitrov kiel nova ĉefredaktoro de la revuo „Bulgara Esperantisto“.

K-do Donĉo Hitrov estas multjara profesia ĵurnalisto, aktivulo de la E-movado.

Dum la Internaciaj E-kongresoj en 1963 j. (Sofio) kaj en 1978 j. (Varno) li estis unu el la gvidantoj de la Kongresa Gazetara Servo.

Dum pli ol 15 jaroj k-do Hitrov estis ĝenerala sekretario de ILEF (Internacia Ligo de Esperantistoj Foto-Kino kaj Magnetofono-Amatoroj) kaj en 1978 j. li estis elektita ties prezidanto.

KORAN DANKON

La Centra Estraro de BEA, la readakcio de „Bulgara Esperantisto“ kaj la Internacia Esperanto-Kursejo kore dankas al ĉiuj ĝeamikoj-esperantistoj, kiuj sendis siajn bondezirojn okaze de la Nova 1980 jaro.

Al ĉiuj, kiuj ĝis nun kunlaboris al „Bulgara Esperantisto“ per artikoloj, rakontoj, versajoj, eseoj, korespondadoj, enigmoj, fotoj ktp., ni sincere dankas, esperante, ke ili ankaŭ dum la nova jaro daŭrigos sian valoran kunlaboradon. Anticipe ni dankas ankaŭ tiujn, kiuj estonte kontribuos por la plibonigo kaj variigo de nia revuo — unu el la plej malnovaj E-eldonaĵoj en la mondo.

La ŝtata Soveto de PR Bulgario honoris akademiano Petro Dinekov per la alta titolo Heroo de la Socialisma Laboro pro lia aktiva sciencesploro, instrua kaj socia laboro kaj lige kun lia 70-jariĝo.

ELSTARA BULGARA ESPERANTISTO — JUBILEULO

Por celebri la 70an jubileon de Ivan Esperov la sofiaj e-istoj kolektiĝis en la salono de E-societo „M. Gorkij“ la 18an de decembro 1980. La celebran kunvenon malfermis kaj gvidis k-do Kunto Vălev — ĝenerala sekretario de BEA.

Raporton pri la vivo, multflanka agado kaj abnegacia batalo de Esperov faris k-do Nikola Aleksiev. (La mal-longigitan raporton ni publikigas ĉi-sube).

Sekvis salutaruloj, gratuloj, enmanigo de donacoj: de K. Vălev — je la nomo de la CE de BEA, Ĥristo Kanev — prezidanto de la Urba Estraro de BEA en Sofio, Belka Beleva — prezidantino de E-societo „M. Gorkij“, Dimitro Haĝiev — prezidanto de la Nacia sekcio de MEM, Stojan Deneva — je la nomo de poŝtista E-societo „Heroldo“, d-ro Stojan Moraresku — el la Medicina sekcio kaj Medicina E-societo „D-ro L. L. Zamenhof“ en Sofio Minko Conkovski — malnova kunbatalinto de la jubileulo k. a.

La jubileulo respondis emociite.

* * *



Sub la pseŭdonimo Ivan Esperov la bulgaraj kaj multaj eksterlandaj e-istoj delonge konas la malnovan veteranon de la bulgara E-movado Ivan Dimitrov Keremedĉiev, apostolo de la Internacia Lingvo en nia lando, multjara redaktoro de „Internacia Jurnalisto“, propagandisto kaj organizanto de plej diversaj aktivecoj inter la esperantistaro. Nun tiu tre populara e-isto atingis — malgraŭ iuj obstakloj de la sorto — respektindan aĝon de 70 jaroj. En lia progresema agado tiu aĝo aperas kiel supro videbla de malproksime. La juna kaj mezaĝa E-generacio povas ĉerpi riĉan sperton el la pli ol duonjarcenta esperantista kaj revolucia agado de nia amiko kaj kamarado Ivan Esperov.

Li naskiĝis la 16-an de decembro 1910 en v. Trajkovo, en la subdistrikto de la danuba havenurbo Lom. Filo el multnombra familio (kun sep geknaboj), kies patro estis mizere pagita oficisto, li nature eniras la mediojn de revoluciaj bulgaraj laboristoj kaj kamparanoj. Apenaŭ 19-jara li fondis en 1930 j. grupon de la laŭleĝa Laborista Partio en u. Lom kaj diversajn organizaĵojn, inter kiuj ankaŭ societon de Laborista E-Asocio. Ivan skribas, presigas kaj disvastigas folion pri la tago de Ĥristo Botev — la 2a de junio.

Pro sia revolucia agado li estas forpelita el la gimnazio kaj malhelpita fari maturekzamenon. Iom poste tamen li sukcesas ekzameniĝi kaj li matrikuliĝas en la Sofia Universitato. Pro lia aktiveco en la vicoj de la progresema

studenta organizaĵo BONSS la polico lin revenigas al Lom. Tie li reokupiĝas pri la gvidado de la Distrikta Komitato de Bulgara Laborista Partio. Kiel sekretario li gvidas la laboron de iuj amasorganizaĵoj. La polico arestas kun li preskaŭ ducent personojn por iniciati kontraŭ ili juĝprocezon laŭ la ege reakcia leĝo „por defendo de la ŝtato“. Ivan kun kelkaj aliaj kamaradoj estas juĝita, tamen dank'al la helpo de progresemaj homoj pravigita kaj liberigita. Li revenas al Sofio, kie daŭrigas sian revolucion agadon. Akurate li gvidas la presfakon de CK de la Bulgara Laborista Partio. Sian panon li perlaboras kiel farbisto kaj telefonteknikisto, komerca laboristo k.a.

En la dummilitaj jaroj oni trifoje mobilizas lin. Inter la soldatoj li organizas grupojn de patriotoj, propagandas la sanktan aferon de la soveta liberiga armeo, kreas ligojn kun la jugoslaviaj partizanoj kaj helpas al ili en ties batalo kontraŭ la okupaciaj germanaj armetrupoj.

Komence de 1944 j. Esperov kun sia familio revenas al Lom. Tie li formas subdistrikta komitaton de Patrolanda Fronto. La 8an de septembro 1944 j. kun siaj kamaradoj li organizas amasan protestan demonstracion antaŭ la malliberejo kun postulo pri liberigo de la politikaj malliberuloj-antifaŝistoj. La sekvan tagon — la historia 9a de septembro — eksplodis la popola armita ribelo, la faŝista registaro estis renversita. Kreiĝis registaro de Patrolanda Fronto.

Post la popola venko li estis oficigita kiel estro de fako „Propagando kaj agitado“ ĉe la Distrikta Komitato de Patrolanda Fronto en u. Vraca. Samtempe li estis ĉefredaktoro de la distrikta ĵurnalo „Oteĉestven Zov“.

Post certa tempo oni oficigas lin redaktoro en la centra partia organo „Rabotniĉesko delo“, kie li funkciis kiel fakestro kaj respondeca sekretario de la redakcio dum pli ol kvar jaroj. Dum dekkvin jaroj Esperov prezidis la sekcion „Loka Gazetaro“ ĉe la Unuiĝo de Bulgaraj Jurnalistoj.

Krom en sia ĵurnalista profesio Esperov uzis sian plumon ankaŭ en la beletrio.

Nia jubileulo lernis E-on en 1924. Post kelkaj jaroj li fondis en Lom societon de Laborista E-Asocio kaj laboris kiel ĝia sekretario. Estante studento en Sofio li fariĝis

respondeca redaktoro de la eldonaĵoj de Laborista E-Asocio „Internacia laborista-kampana korespondanto“ kaj „Informilo“. Pro la enhavo de iuj artikoloj en tiuj eldonaĵoj la prokuroro iniciatis juĝprocecon kontraŭ la redaktoro laŭ la drakona Leĝo por defendo de la ŝtato.

Aparte fruktodona estas la gvida laboro de Esperov en la E-movado dum la periodo 1937–1944. En „Bulgara esperantisto“, kies vicredaktoro li estis, li publikigas artikolojn pri la ŝtato kaj la aktualaj taskoj de la bulgara esperantistaro. Sinsekve li fariĝas redaktoro de E-paĝoj en la ĉiutagaj gazetoj „Zarja“ kaj „Nova Kambana“. Sur tiu kampo estas tre rimarkindaj la propagandistaj kaj organizaj kvalitoj de Esperov. Je la nomo de BEA li gvidis du landajn kongresojn en Plevnen kaj Loveĉ kaj unu landan E-konferencon en Plovdiv. Esperov savis la honoron de la tiama BEA ĉe cirkonstancoj tre malfavoraj por la progresema agado.

Laŭ iniciato kaj sub la redakto de Esperov en 1941 j. estis eldonita „Popola Kalendaro Esperanto“. Ĝi prezentas 48-paĝan broŝuron kun tre interesaj antifaŝismaj materialoj el sub la plumo de konataj bulgaraj kaj eksterlandaj aŭtoroj, amikoj de E-o. Esperov sukcesis eldoni kaj disvastigi ĝin, ĉirkaŭante la faŝistan cenzuron. La triopo de aktivuloj Esperov, Oljanov, Bujukliev instigis eldonadon de „Albumo de bulgaraj esperantistoj“ en u. Ruse kaj ankaŭ publikigon (kunlabore kun hungara E-Asocio) de „Aldono“ al „Hungara Heroldo“. Tiu „Aldono“ estis en 1943 la fakta organo de BEA post la malapero de „Bulgara Esperantisto“, kies oficiala redaktoro

estis prof. St. Ĝuĝev.

Post la liberigo de Bulgario el sub faŝista jugo Keremidiev estis invitita al Sofio okupi la sekretarian postenon de CK de BEA. Samtempe li estis kunredaktoro de „Bulgara Esperantisto“. Poste li laboris kiel membro de la redaktaj komitatoj de „Internacia Kulturo“ kaj „Nuntempa Bulgario“, gvidataj de Asen Grigorov. Li redaktis ankaŭ „Esperanto-kalendaron 1948“ kaj jubilean E-gazeton.

Esperov estas senintertombe elektata membro de CK de BEA. Antaŭ nelonge dum 7–8 jaroj li estis viceprezidanto kaj poste prezidanto de la plej amasa landa E-societo, „M. Gorkij“ en Sofio.

Ekde 1956 Ivan Keremidiev estas ĉefredaktoro de „Internacia Jurnalisto“ — organo de Tutmonda Esperantista Jurnalista Asocio (TEJA). Nun li estas ĝia viceprezidanto.

Jen en ĉefaj linioj la agado de nia jubileulo, kies detala biografio povus plenigi la paĝojn de kompleta broŝuro. Reliefiĝas lia figuro de senhezita revoluciulo, batalanto por pli feliĉa estonteco de la bulgara popolo.

Kiel fervora amiko de la soveta popolo kaj propagandisto de ties sukcesoj en la nova socialisma kaj komunisma socio, Esperov estas organizanto kaj kunfondinto de societoj de bulgara-soveta amikeco jam dum la ekzisto de faŝisma diktaturo.

Pro sia riĉenhava populutila agado Ivan Esperov ricevis multajn medalojn kaj ordenojn. Lige kun lia 70-jariĝo li estas dekorita per la alta ordeno „Popola Respubliko Bulgario“ — II grado.

Korajn salutojn al la nelacigebla veterano!



ZAMENHOF-CELEBROJ

La 15a de decembro estas dato, kiu ankoraŭ ne figuris kiel festotago en iu ajn kalendaro, sed kiu unuigas la tutmondan esperantistaron. Tiam naskiĝis d-ro Lazaro Ludoiko Zamenhof, kreinto de la internacia lingvo E-o. Tiun daton la e-istoj en ĉiuj landoj ĉiujare ame celebras.

Sofio. E-societo „M. Gorkij“ [organizis tagojn de Zamenhof. La feste ornamita nova klubo sur bul. „Ĥristo Botev“ 90 malferrimis sian pordon por gastoj. Oni trarigardis fotojn, librojn pri la amata Majstro. En tri tagoj pri Zamenhof prelegis Rajna Konstantinova kaj Georgi Dolapčiev. La gastoj estis regalataj. Regis agrabla etoso.

La kvaran tagon okazis la Zamenhof-festo mem. Pri la vivo kaj agado de la aŭtoro de E-o parolis k-d-o Ĥristo Gorov — prezidanto de BEA. Junaj e-istoj el E-societo „V. Levski“ okazigis kvizon. Ĉiuj kunvenintoj estis regalitaj per dolĉaĵoj, hejme prearitaj de niaj sammembriroj. Oni kantis kaj amike babilis, runde sidantaj.

Zora Oŝanska

Ŝofio — Instruista E-societo „Diĉo Petrov“. Prelegis k-dino Vera Văjarova. Ŝi prezentis la vivon de Zamenhof laŭ la biografio verkita de la fama E-poetino Marĵori Boulton.

Văjarova bonege interpretis la intiman etoson, regantan en la familio de Marko kaj Rozalia Zamenhof, gepatroj de sep infanoj. Ŝi bildece prezentis la gravajn momentojn en la vivo-vojo de ilia plej aĝa genia filo.

La diversaj situacioj en la vivo de Zamenhof estis interpretitaj per esprimriĉa voĉmodulado de k-dino Văjarova, kio, kune kun la enhavoriĉa prelego, profunde emociis la dankoplenan publikon.

Rajna Arnaudova

Varna. Solena tuturba kunveno okazis en la salono de popola legejo „Văzrajdane“. Ĉeestis pli ol 80 e-istoj el ĉiuj E-societoj, ankaŭ nee-istoj. Priokazan raporton faris Saŝa Nedeva — sekretariino de E-societo „Albatroso“ kaj de la DE de BEA. Lernantoj el lernejo „Ĥaĝi Dimitro“ sub la gvido de sia E-instruistino Dobrinka Trăpkova kantis. La belartan programon partoprenis ankaŭ amatora kantgrupo el E-societo „Ŝipriparisto“. La studento Plamen recitis „La vojon“.

La sekvan vesperon en restoracio „Pliska“ okazis bankedo kun riĉa programo, dancoj, kvizo, tombolo, diversaj amuzludoj. La tuta restoracio estis ornamita per E-flagetoj kaj steletoj. Pli ol 55 gee-istoj el ĉiuj E-societoj de la urbo plezure amuziĝis.

Saša Nedeva

Gabrovo — „Verda Torĉo“. La e-istoj de Gabrovo frue komencis prepari sin por digne celebri la naskiĝtagon de Zamenhof. Honore al ĝi estis organizita E-kurso de III grado. La respondeculoj por la abonado kolektis 85 abonojn por „BE“ kaj tiel superplenumis la

donitan de CE planon. Estis kolektita 60% de la membrokoto por 1981.

Krom la malnovaj e-istoj ĉeestis ankaŭ la novaj — el la du elementaj kaj du progresintaj kursoj, gvidataj de Djanko Minčev, Petko Totev kaj Ljubomir Dimitrov. Partoprenis ankaŭ la E-klaso de k-dino Sonja Tiĥova el lernejo „Tanja Karpinskaja“.

Raporton pri la vivo kaj agado de Zamenhof faris Neno Janev — prezidanto de la DE de BEA. Belartan programon prezentis la lernantoj de S. Tiĥova. Estis projekcila filma skizo pri la 65a UK de E-o en Stokholmo.

Nikola Poparov

PLENKUNSIDO DE LA DE EN

V. TĀRNOVO

La 21an de dec. 1980 en Gorna Orjakhovica okazis plenkunsido de la Distrikta Estraro de BEA. Ĝi traktis la demandojn pri la instrulaboro kaj la abonkampanjo.

Oni konstatis, ke ekde la komenco de la nova lernejo en multaj lokoj de la distrikto ekfunkciis E-kursoj: preparigas la grundo por fondo de E-societoj en Dolna Orjakhovica, Elena, Suhindol.

La abonkampanjo en la distrikto pasis bone: oni plenumis la abonplanon de asocia organo „Bulgara Esperantisto“.

L. Tr.

KUNVENO-KONCERTO EN BOTEVGRAD

Varij estas la vesperaj programoj en la Klubo de la Kulturagantoj en Botevgrad. Unufoje la 26an de novembro pasintjare tie okazis vespero de la e-istoj. Car la salono ne estas sufiĉa por amasa publiko, oni dissendis limigitan kvanton da invitiloj: do kolektiĝis ĉ. 70 personoj — precipe reprezentantoj de diversaj kultur-institucioj kaj fakoj, kiuj forte efikas kaj gvidas la kulturalan vivon en la urbo.

La vesperon malfermis k-do Mitrofan Veleŭ, prezidanto de la loka, tute juna, fondita en 1980 j. E-societo „Trifon Aristovski“ kaj ĉefredaktoro de la j. „Botevgradski Plamāk“. Li koncize parolis pri la E-movado en la regiono de Botevgrad en la pasinteco kaj nun kaj prezentis la partoprenantojn en la programo el Sofio: gekadamarojn Kunco Vālev — ĝenerala sekretario de BEA, Vera Vājarova — artistino, Maria Angelova — soprano el la Ĉefa Direkcio „Bulgara muziko“, Dimitro Denĉev-tenoro kaj Sneĵana Barova — pianistino.

En sia prelego K. Vālev konigis al la publiko la problemon pri internacia lingvo kaj ĝia solvo pere de E-o, ankaŭ la populutilan agadon de la bulgaraj e-istoj. V. Vājarova recitis E-poezion. M. Angelova kaj D. Denĉev plenumis repertuaron el kantoj en bulgara, rusa, itala, franca kaj E-o.

Fine oni invitis la ĉeestantojn trarigardi la ekspozicion de Vanko Bārdarov — nia fervora samklubano kaj pentristo.

Nia publiko estis tre kontenta kaj danki al ĉiuj partoprenintoj en la E-vespero. Oni longe memorigis ĝin.

J. G.

KUNVENO-KONCERTO ANKAŬ EN SLIVEN

La 12an de decembro 1980 en la Kulturdomo de Sindikatoj en Sliven okazis kunveno-koncerto, organizita de la loka E-societo kaj la Domo. Ĉeestis 55 personoj, plejparte neesperantistoj.

Pri la internacia lingvo E-o kaj pri la diversflanka agado de la bulgaraj e-istoj — patriotoj, internaciistoj, humanistoj kaj pachtalantoj — parolis arde k-do K. Vālev — ĝenerala sekretario de BEA. Bonegan koncerton el kantoj en diversaj naciaj lingvoj kaj E-o prezentis la gekantistoj Maria Angerova, Dimitro Denĉev kaj la pianistino Sneĵana Barova — ĉiuj el Sofio.

Post la kunveno-koncerto la gastoj kaj la loka E-aktivularo pasigis kune agrablajn horojn en amika interparolado ĉe kofetelo.

K. K.

ESPERANTO EN LA FILATELO

En urbo Sumen ekde la 20a ĝis la 30a de novembro 1980 j. estis organizita la III distrikta filatela ekspozicio, dediĉita al la 1300-jara datreveno de la bulgara ŝtato. Filatelistoj de urboj Sumen kaj Novi Pazar ekspoziciis siajn kolektojn.

Ankaŭ la prezidanto de la loka E-Societo „Vekiĝo“ Cvjatko Todorov partoprenis tiun ĉi ekspozicion per sia kolekto titolita „Esperanto en la filatelo“. Sur du tabuloj li ekspoziciis 32 filatelajn foliojn. Sur la unua li aranĝis la kolektaĵojn de li dum kelkaj jaroj poŝtmarkojn el diversaj landoj, dediĉitajn al elstaraj personoj el la historio — amikoj de la ideo pri Internacia Lingvo, al famaj e-istoj kaj subtenantoj de E-o. Sur la alia tabulo sub la moto „Esperanto, paco, amikeco“ oni vidis ricevitaĵojn el diversaj landoj leterojn kaj bildkartojn okaze de la 75-jara datreveno de la fondiĝo de E-Societo „Vekiĝo“ kun valoraj poŝtmarkoj kaj sigeloj.

Grandan intereson pro sia aktualeco vekis la eksponita kolekto el hungaraj kaj sovetaĵ poŝtmarkoj, unuataĝaj kaj veturintaj kovertoj kaj bildkartoj, eldonitaj okaze de la kuna flugo de la kosmonaŭtoj V. Kubasov kaj Bertalan Farkaš (la unua en la mondo esperantisto-kosmonaŭto). Al tiu ĉi kolekto la juĝkomisiono aljuĝis la III premion — bronzan medalon.

D-ro Nikola Tanev

La membroj de E-societo „Homeco“ en urbo Popovo manifestaciis okaze de la nacia festo de Bulgario — la Naŭa de Septembro



VERDA TABULO

Denove nia fervora aktivulo kaj amiko de „Bulgara Esperantisto“

DIMITRO IVANOV

el Plovdiv inde plenumis sian E-devon. Dum la abonkampanjo de E-periodaĵoj por 1981 j. li kolektis jenajn abonojn ĝis la 10a de decembro 1980:

Bulgara Esperantisto	— 180
Paco	— 18
Scienco Mondo	— 28
Kolektanto	— 18
Der Esperantist	— 10
Hungara vivo	— 3

Samtempe li kolektis la kotizon de 167 membroj de sia E-societo „Kulturo“.

K-do Ivanov plue — post la limtempo de la poŝto — kolektas abonojn por „BE“, kiujn li sendas al la redakcio.

Sekvu la ekzemplon de nia sindona aktivulo!



BONA PROPAGANDO — BONAJ REZULTOJ

La estraro de E-Societo „David Sasonov“ — Asenovgrad, zorgeme organizis la propagandon pri la nova lernejo. Tra la tuta urbo estis disigitaj afiŝoj pri la kursoj organizitaj. Pri ili kaj pri la agado de la e-istoj ofte anoncis la urba radioreto. Estis presitaj kaj dissenditaj al multaj adresoj specialaj invitiloj. En la propaganda laboro estis mobilizitaj ĉiuj e-istoj. Kaj la rezultoj venis abunde: kandidatoj por 7 kursoj!

Por komencantoj funkcias po unu kurso en la gimnazio, ĉe la Patrolanda Fronto, en lernejoj „Nikola Vapcarov“, „Otec Paisij“ kaj „Nevena Jordanova“ — gvidantoj Deŝka Kasarova, Sinka Filaretova, Velurina Ĉirpanska. Kurson por progresintoj gvidas Emil Ĉirpanski. En vilaĝo Cerven same ekfunkciis elementa E-kurso, gvidata de nia aktivulo Iliev.

„Komenco bona — laboro duona“ — diras la proverbo. Nun ni obstinas por ĝisfine efektiviĝi la komencajn sukcesojn.

Emil Ĉirpanski

VIGLA AGADO DE «LUMO»

— Renkontiĝoj kun elstaraj personoj — esperantistoj-batalantoj kontraŭ faŝismo kaj kapitalismo;

— Prelegoj;
— Ekskursoj;
— Kursoj de E-o en lernejoj kaj entreprenoj;
— Gastigo de fremdlandaj e-istoj...

Jen nur kelkaj linioj el la riĉa laborplano de E-societo „Lumo“ en Veliko Tŕnovo por la kuranta sezono.

Jam estas konataj la lernejoj kaj la entreprenoj

PASPORTA SERVO — REKORDE AMPLEKSA

La ĵus aperinta listo de gastigantoj estas rekorde ampleksa. Ĝi donas eblecon al junuloj kaj fakte al ĉiuj malmultekoste, sed inde turismi uzante listojn de e-istoj, kiuj pretas senpage gastigi vojaĝantajn samideanojn (minimuma kontribuo povas esti petata por manĝoj). Malfermitaj pordoj estas tiel troveblaj tra la tuta mondo.

Inter 1975 kaj 1980 j. la nombro de gastigantoj en la Pasporta Servo de TEJO kreskis de 97 ĝis 360. La nombro de landoj, kie troveblas gastigantoj, simile kreskis de 32 ĝis 48.

en la urbo, kie ekzistas eblecoj, por instruado de E-o. En la plejparto de tiuj ĉi punktoj jam komenciĝis la instrulaboro.

Estis efektiviĝintaj kelkaj interesaj renkontiĝoj en la kluboj de la societo. K-do Dimitro Moskov, aktivulo de la movado de abstinentoj, rakontis al la partoprenantoj pri sia korespondado kun la mondframa svisa prof. d-ro August Forel kaj disponigis al la societo du fotoreproduktaĵojn de li. K-do Moskov ankaŭ donacis al la societo la unuan jarkolekton de revuo „Junularo“, aperinta dum 1925/26 en Varno. Li ricevis ĝin kiel e-isto kaj redaktoro de „Trezva Misal“ („Sobra penso“), aperanta dum tiu periodo en V. Tŕnovo.

En la ĉiujaraj kunvenoj de la societo oni povas aŭskulti interesajn prelegojn, akompanatajn de projekciado de diapozitivaj kaj fotobildoj. K-dino Maria Pejnova prelegis pri la Granda Oktobra Revolucio kaj pri Lenin-lokoj en Leningrado. Liliana Ivanova rakontis pri sia ekskurso al Hispanio, kie ŝi vizitis la kongreson de la hispanaj e-istoj en Validolid. La nova e-istino Maria Simeonova rakontis pri sia ekskurso al Finnlando kaj Anglio.

La senlaca prezidantino de la societo k-ino Maria Pejnova gvidas E-kursojn en du mezlernejoj kaj tri kursojn por civitanoj.

Kursoj por komencantoj okazas ankaŭ en la ekonomia mezlernejo (instruas Penka Kateva). Ĥristo Dolĉinkov gvidas forestan kurson por ĝeinstruistoj kaj instruas ankaŭ en la uzino por tranĉiloj. En li gimnazio instruas Olga Cankova.

Ne estas forgesitaj ankaŭ la plej junaj, por kiuj estas organizita E-kurso en la Palaco de Junpioniroj, gvidata de Elisaveta Koleva.

Ni atendas ankoraŭ pli viglan agadon de nia E-societo „Lumo“ ankaŭ dum la nova 1981 jaro.

Nikola Najdenov

La nova listo, kiu unufoje enhavas ankaŭ mapojn, estas aĉetebla de: J.-M. Cash, 9, rue du Languedoc, F-78690 Les Essarts-le Roi, Francujo, kontraŭ 15 francaj frankoj aŭ internaciaj respondkuponoj, pĉk. 25 426—58 Paris; de la libroservo de UEA (inkluzive aliĝon) kontraŭ 7.50 gld.

Seso da landaj sekcioj de TEJO nun preparas nacilingvajn anoncojn por presigo en junularaj gazetoj, por allogi la junularon al E-o per malkaŝo de la turismaj eblecoj de la Pasporta Servo.

ENTUZIASME

Junulino kun modesta aspekto. Apotekistino. Sed oni ekkonos ŝin de proksime, se ĉeestos la kunvenojn de la E-sekcio ĉe klubo „Internacia Amikeco“ en la Distrikta Junulara Domo en urbo Vidin, kiujn gvidas Verĵinija Dokova. Oni tuj eksentos ŝian ageman kaj energian naturon.

Eklerninte Esperanton en 1974 en kurso de Georgi Simeonov, Verĵinija entuziasmiĝis, diligente perfektigis siajn lingvokonojn kaj grave vastigis sian kulturon. Per internacia korespondado ŝi konatigis kun la kulturo, vivmaniero, moroj kaj popolkutimoj de proksimaj kaj malproksimaj popoloj. Nuntempe Verĵinija havas 60 leteramikojn en dek landoj. Pri ŝia multfaceta personeco atestas ankaŭ ties ŝatokupoj dum la libera tempo: kuirado, brodado, vojaĝado, legado de belarta literaturo. Organizajn spertojn ŝi akumulis, partopreninte en la 63a Universala Kongreso de E-o en Varno, en la Internacia Junulara E-Laborbrigado en urbo Bekeŝaba (Hungario) kaj en multaj enlandaj junularaj E-aranĝoj. Verĵinija Dokova reprezentis E-



societon „Espero“ (Vidin) en konferenco en la ĝemela urbo Sverin (GDR) kaj estis delegito de BEJ en la Junlara E-Seminario en Fjoben (GDR).

La rezultoj ne malfruiĝis. Laŭ ŝia iniciato je la 22a de decembro 1978 oni fondis junularan E-sekcion ĉe la junulara domo en Vidin. La sekcio disvolvis viglan porokaj peresperantan agadon: kurso por komencantoj, prelegoj, diskutoj, amuzvesperoj, internacia korespondado, partopreno en junularaj E-aranĝoj kaj en neesperantistaj programoj de la Distrikta Junu-

lara Domo. La E-sekcio okupis merite unuan lokon en la konkurado inter junularaj, studentaj kaj lernejanaj societoj kaj grupoj dediĉe al la 40a Jubilea Kongreso de BEA en Plovdiv. Oni malofte pensas kun kiom da fortostreĉoj, zorgoj kaj „kurado“ estas ligita la glata okazigo de iu kunveno, prelego aŭ diskoteko, sed ĉiam oni scias, ke la ĉefa ŝarĝo falas sur Verĵi. Tiel la junaj esperantistoj el Vidin nomas karese la prezidantinon de la E-sekcio Verĵinija Dokova.

La bonegaj sukcesoj en la laboro de Verĵi ŝuldiĝas al ties societemo, sindono al E-o kaj miriga kapablo altiri gejunulojn al nia afero. Si profitas ĉiun utilan okazon por sendi priagadan korespondadon al „BE“ aŭ al la distrikta ĵurnalo „Cerveno Zname“. Jam duan jaron Verĵi gvidas sukcese E-kurson por komencantoj. Si ĉiam apogas sin je vasta anaro ĉe organizado de la sekcia agado kaj bone distribuas la taskojn. Ĉio ĉi elstarigas ŝin kiel sekvidan ekzemplon de fervora kaj sindona aganto por la nobla kaj humana ideo de nia E-movado.

LABORISTA GRATULO

Mi estas 23-jara laboristo. Pri E-o mi komencis okupiĝi apenaŭ antaŭ unu jaro. Sed mi firme deklaras, ke E-o estas facila kaj alirebla lingvo, kiu proksimigas kaj amikigas la homojn trans limoj. Mi ja mem konvinkigis pri tio, ĉar dum mia nerica sperto de e-isto mi konatigis kaj amikiĝis kun gejunuloj el pluraj fremdaj landoj.

Nun mi havas dek leteramikojn el Pollando, Hungario, GDR, Sovetunio. Pere de ili mi eksciis multon pri la kulturo, vivmaniero, moroj kaj kutimoj en tiuj landoj.

Dank'al la Internacia Lingvo en 1979 j. mi havis eblecon partopreni la internacian E-laborbrigadon en urbo Bekeŝaba (Hun-

gario), kie mi starigis personajn kontaktojn kun multaj junaj gee-istoj. Ege impresis min la vigla kaj spontana diskutado pere de E-o en la pasintjara junulara E-seminario en urbo Rathenow (GDR), kiun partoprenis gejunuloj el socialismaj landoj.

Okaze de la Nova Jaro mi gratulas elkore ĉiujn junajn kaj plenaĝajn gekamaradojn je la nomo de la laborista E-junularo en Bulgario. Mi bondeziras al ĉiuj dum 1981j. fortikan sanon, feliĉon, ĝojon kaj multajn sukcesojn en la laboro kaj la persona vivo, sur la kampo de Esperanto!

Bojan Karastojanov,

muntisto en uzino „Bulgario“—Sofio

NACIA STUDENTA KONFERENCO EN V. TÂRNOVO

Jam fariĝis tradicio en la tagoj ĉirkaŭ la studenta festo — la 8a de decembro — okazigi nacian studentan konferencon. La lasta okazis la 13—14 de decembro 1980 en la Universitato „Kiril i Metodi“ en la antikva bulgara ĉefurbo Veliko Târnovo. Ĝin partoprenis ĉ. 70 studentoj kaj junuloj el la tuta lando.

Per „Bonan venon!“ komencis sian salutparoladon la ĉefa asistento Kosjo Penčikov. Li salutis la konferencanojn je la nomo de la Rektora Konsilantaro de la Universitato kaj rakontis pri la historio de la universitato—heredanto de la Literatura Skolo de Târnovo, doninta tiajn figurojn dum la mezepoko kiel Teodosij Târnovski, Evtimij Târnovski, Kiprian, Grigorij Camblak k. a. K-do Penčikov ankaŭ substrekis la pozitivan rolon, kiun la E-societo „Flamo“ ludas en la vivo de la studentoj en Târnovo, ankaŭ la helpon, kiun donas al ĝi la rektoro prof. Angel Davidov, kiu mem estas esperantisto.

Salutvortojn al la konferencanoj diris ankaŭ la ĝenerala sekretario de BEA Kunčo Vălev, la prezidantino de BEJ Steliana Dimitrova kaj la prezidanto de la loka studenta E-societo „Flamo“ Ljubomir Trifončovski.

En la vigla diskutado partoprenis 10 personoj, kiuj prezentis interesajn momentojn el la sperto

de siaj E-societoj kaj dividis utilajn pensojn kaj rekomendojn: la e-istoj ne devas labori izolite, sed ĉiam kune kun la ceteraj organizaĵoj; la societoj devas agadi laŭplane; ege necesaj estas junaj kursgvidantoj, do la junaj homoj devas pli fervore lerni kaj ekposedi la Internacian Lingvon, fariĝi bonaj kursgvidantoj, originalaj E-aŭtoroj, tradukistoj, artistoj ktp.; krei propran materialan bazon por instruado, amuzado ktp., necesa estas nuntempa distra muziko en E-o; labori kune kun la junularaj kaj sindikataj kulturdomoj, kun popolaj legejoj, aŭtoritataj e-istoj kaj uzi ties eblecojn por la progreso de nia afero; nepre okazigi tiajn amas-arangojn, kiuj impresas la vastan publikon (festivalojn, laborbrigadojn, spektaklojn, amuzvesperojn kaj balojn, ekskursojn tra la lando kaj eksterlando; krei interesan internan vivon en ĉiu E-societo; formi grupojn, laŭ intereso kaj hobiaj (folistoj, filatelistoj, artistoj k. a.). Ĉiuj substrekis la neceson modernigi nian propagandon, intensigi nian perserpantan laboron, kiu estas la plej rezultodona propagando pri la internacia lingvo.

La studenta konferenco en V. Târnovo estis vigla kaj laborinstiga. Ni kredas, ke ĝi donos bonajn rezultojn.

L. Trifončovski

PUPOJ PAŬOLAS EN ESPERANTO

Komence de oktobro 1980 la Stata Pupteatro en Gabrovo prezentis unuafoje en E-o sian pupspektaklon „Fabelo pri Kateto, Steleto kaj pri io alia“ de Zlatina Biljarska. Por la spektantoj, e-istoj el Gabrovo, Sevlievo kaj Drjanovo, tiu prezentado estis grava kultura evento kaj neforgesebla ĝoja festo. La junaj geaktoroj Bojka Cvetanova (Kateto), Zoja Nikolova (Steleto), Gatjo Damjanov (Hundo) kaj Ruska Danailova (Luno), tiel majstre gvidis la pupojn kaj tiel senerare, klare kaj dolĉe parolis en E-o, ke neniu volis kredi, ke ili sukcesis prepari siajn rolojn nur post mallonga rapidkurso de E-o. La sukceso estis vere granda. La publiko, agrable surprizita kaj ravita de tiu admirinda spektaklo, rekomencis per tondraj aplaŭdoj kaj floroj la geaktorojn, la reĝisoron Nikolaj Kolev kaj la tradukinton de la prezentaĵo Neno Janev. Speciala danko estis esprimita al la direktoro

de la teatro Ivan Kiskinov.

En la 13a Pupteatra Internacia Festivalo (PIF), okazinta je la 9—12 de oktobro 1980 en Zagreb, Jugoslavio, kiun partoprenis naŭ pupteatroj el ses landoj, la Stata Pupteatro de Gabrovo ricevis por sia prezentaĵo ses premiojn: unuan premion de la infana ĵurio, la premion Tibor Sekelj por plej homama mesaĝo de la prezentaĵo, la premion de la lingva ĵurio por plej bona surbendigita lingvo de la prezentaĵo, la specialan premion de la faka ĵurio por plej bona animigo de pupoj kaj du individuajn premiojn por aktor-animiga kreado de la rolo — al Bojka Cvetkova (Kateto) kaj al Gatjo Damjanov (Hundo).

Tiu grava sukceso de nia pupteatro plialtigis la aŭtoritaton de la Internacia Lingvo en Gabrovo kaj gajnis novajn amikojn de nia movado.

Stefka Ŝumkova

La trupo de la Stata Pupteatro de Gabrovo

NOBLA FARO — SEKVINDA

En Svištov nia sindona s-anino Krăstina Vasileva donacis al la loka E-Societo „Danuba Stelo“ sian E-bibliotekon el 84 libroj.

S-anino Vasileva estas malnova e-istino, unu el la fondintoj de E-Societo „Danuba Stelo“, multjara membro de ĝia estraro (sekretario, vicprezidanto, prezidanto k.a.). Ŝi ankaŭ gvidis E-kursojn. Pro ŝia sindona E-laboro la Centra Estraro de BEA distingis ŝin per la honora insigno de la Asocio (ora).

La faro de s-anino Vasileva estas nobla, ŝia ekzemplo — sekvinda.

K. Mateeva



Bulgaraj kantistoj-esperantistoj gastludis eksterlande

SUKCESO DE VESELIN DAMJANOV EN FR GERMANIO

Antaŭ nelonge Veselin Damjanov, artisto el la Ŝtata Muzikteatro „Stefan Makedonski“—Sofio, partoprenis la 5an laborkonferencon „Interlingvistiko en Scienco kaj Klerigo“, okazinta en Paderborn. Enkadre de la konferenco li prelegis je temo „La kanto kiel rimedo por instruado de la Internacia lingvo“.



Samtempe por la paderbornanoj k-do Damjanov donis en la urba teatro du memstarajn koncertojn „Eŭropaj kantvesperoj“, organizitajn de „Vestfeliŝe kamerŝpile“.

La gazetaro spegulis la sukcesojn de nia samideano per artikoloj kaj fotoj. Ĵurnalo „Noje Vestfeliŝe“ sub titolo „Kantisto kaj pianisto montris altnivelan muzikan arton“ skribis:

„Bonege akompanataj plane de Norbert Soemer, la koncertoj de la bulgara baritono Veselin Damjanov „Eŭropaj kantvesperoj“ estis eksterordinaraj muzikaj festoj por nia urbo. En sia vasta kaj bunta programo ekde klasikaj kaj slava folkloro ĝis la franca kanzono, la artisto montris sian grandegan voĉon kaj aktoran amplitudon. Parolante pri lia interpretado oni devas havi imagon pri unu ege riĉa sintezo de bone regataj elementoj: muziko, teksto kaj mimiko.“

Damjanov plenumis ariojn kaj kantojn en multaj eŭropaj lingvoj, inkluzive en Esperanto, kun larĝa, varma voĉo, atingante sian supran punkton per la plenumo de „La pulo“ de Musorgskij. La kantisto pruvis sian altnivelan majstrecon en plenumo de popolkantoj, sen forgesi eĉ la francan kanzonon „Majstro Pierre“.

Ĵurnalo „Paderborner Spiegel“ skribis: „Veselin Damjanov brile impresas ne nur per sia belega kantarto, sed ankaŭ per siaj mirindaj aktoriaj kapabloj. Rimarkinda estas lia talento kanti ĉiujn kantojn originallingve.“

NE FORGESU!

La la de marto ĉ.j. estas la lasta limdato por aliĝi al la III INTERNACIA MEDICINA E-KONFERENCO.

BRITOJ APLAUDIS PRODANOV

La bulgara kantisto kaj esperantisto Prodan Prodanov el la Ŝtata Muzikteatro en Sofio, jam estas konata al la publiko en Wales, Britio, kie en 1979 j. li partoprenis Internacian Horan Konkuradon.

Antaŭ nelonge Prodanov denove vizitis Brition — ĉi-foje kiel privata turisto-esperantisto. Li gastis al siaj geamikoj — s-ino Joy Gomeŝ kaj s-ro Tony Cartwright en urbo Norwich. Kun ili li konatiĝis dum la Universala Kongreso de Esperanto en Varna. S-ino Gomeŝ instruas matematikon en mezlernejo kaj ankaŭ Esperanton. S-ro Cartwright estas vicdirektoro de Keswick Ĝenerala Mezlernejo kaj ankaŭ li instruas Esperanton.

Kvankam la gastado de Prodanov estis privata — laŭ invito de la estraro de Hewett Mezlernejo, li partoprenis riĉan muzikprogramon kune kun la horo ĉe la preĝejo Sankta Andreo en Norwich.

La loka gazeto „Eastern Evening News“ publikigis specialan artikolon, titolitan „Bulgara solisto gastludas“, kies aŭtoro alte taksas la arton de nia samlandano: „... Nia gasto de la Bulgara Ŝtata Muzikteatro s-ro Prodan Prodanov ĉarmis la publikon per siaj kantoj el Bulgario, Rumanio kaj Italio, akompanante sin per gitaro. Tio estas lia unua publika koncerto en Britio kaj li montris al ni kun granda inspiro altan majstrecon. Lia delikata tenora voĉo plifortigadis de la perfekta akustiko...“

Por k-do Prodanov estis organizita koncerto en Keswick Ĝenerala Mezlernejo kie li prezentis „muzikan bukedon“ el operoj, operetoj kaj popolaj kantoj, kelkaj el ili en Esperanto.

Kiel konate, k-do Prodanov estas ankaŭ pentristo kaj dum la gastado en Norwich en la granda halo de Keswick Mezlernejo estis organizita modesta ekspozicio de liaj pentraĵoj, kiujn la vizitantoj alte pritaksis — ĉefe pro ilia specifa bulgara atmosfero kaj karaktero.

P. Prodanov, s-rino Joy Gomeŝ kaj s-ro Tony Cartwright en amika interparolo.





Proj. Stojan Petrov

LUMO EL LA JARCENTOJ

700 JAROJ EKDE LA NASKIGO DE JOAN KUKUZEL

La historio ne nur naskas grandajn personojn, sed ankaŭ memoras kaj konservas ilin por la estontaj generacioj, ĉar per ilia krea genio kaj faroj konstruigas paŝo post paŝo la tutomara progreso. Tia granda persono por nia historio estas **Joan Kukuzel**, kies 700-jaran datrevenon de la naskigo nun notas la ŝatantoj de la muziko en la tuta mondo. La granda renkonto de la faroj kaj kontribuoj de la inspirita kreinto de „Elegio pri la bulgarino“ ŝuldiĝas al lia riĉa kaj multflanka muzikagado, lasinta daŭrajn spurojn ne nur en la kulturo de la ortodoksa Oriento, sed ankaŭ en la tuteŭropa kaj monda kulturo.

La historia misio de Kukuzel memorigas multe la rolon kaj signifon de Teodosij Tarnovskij, patriarko Evtimij, Grigorij Cambalak, Kiprian, Konstantin Kostenecki, kiuj estas naskitaj sur la bulgara tero, vivas kaj kreas en la sama epoko kaj apartenas ne nur al nia popolo, sed ankaŭ al proksimaj kaj malproksimaj popoloj.

Eminenta reprezentanto de tempesta kaj drameca epoko, **Joan Kukuzel** ne estas la nura elstara muzikisto inter siaj nuntempuloj-kreantoj. La historio de la bulgara muzika kulturo komenciĝas per la nomoj de Kiril kaj Metodi, de Kliment kaj aliaj instruistoj de la fratoj el Tesaloniki, kreintoj de la malnovbulgara preĝkantado. Ekde tiam por la evoluo de la bulgara preĝkantado kontribuas multaj kreantoj, kiuj laboris en diversa tempo kaj en diversaj anguloj de Bulgario.

La skalo de **Joan Kukuzel** kiel kantokreanto, teoriulo kaj muzikpedagogo venas el la karaktero de la epoko mem, kiu lin naskas kaj elkondukas sur la historian scenon: epoko tiom rimarkinda, kiom drameca kaj sortodecida por Bizanco, Bulgario kaj la ceteraj balkanaj landoj. El la potencaj ĝis tiam balkanaj ŝtatoj estas detranĉitaj vivaj partoj: en 1204 j. por ses jardekoj Konstantinopolo fariĝas ĉefurbo de la Latina Imperio. En la dua duono de la

XIV jc. Adrianopolo (Odrin) jam estas rezidejo de la otomanaj konkerantoj. Pro rabado kaj detruado suferas la preĝejo kaj monaĥejoj sur la malgrandazia kaj nigramara bordo — en Aton, Paroria kaj la tuta duoninsulo. Al ĉio ĉi aldoniĝas la fakto, ke dum kvin jarcentoj (VIII—XIII) la orienta preĝkantado disvolviĝas neorganizite kaj ĉe la kreintoj malfavoraj kondiĉoj estas minacata de dekadenco kaj malapero.

La minaco, kiu pendas super la balkanaj popoloj kaj kulturoj, naskas atmosferon de daŭra kunlaborado, kiu ekde tiu momento ludas grandegan rolon en la historio de ĉiuj popoloj el la ortodoksa Oriento.

Por la spirita renaskiĝo de la reakirita en 1261 j. Konstantinopolo kaj por la restaŭrado de la kaŭzitaj grandegaj damaĝoj oni prenas urgajn rimedojn. En ĉiuj anguloj de Bizanco kaj en la najbaraj landoj oni eltrovas muzike talentajn infanojn, kiuj lernas per ŝtataj monrimedoj en la nefondita imperatoria muziklernejo en Konstantinopolo. Inter ili estas ankaŭ la estonta reformanto de la orienta kantado **Joan Kukuzel**. La biografiaj donitaĵoj pri li estas malriĉaj. Oni scias nur, ke li naskiĝis en Duraco (Draĉ) de bulgara patrino. Jam malgranda infano li fariĝas orfo; pro sia eksterordinara muzika talento ne post longe li aperas en la imperatoria lernejo por kantistoj, „rapide progresas en la scienco... lernas grekan lingvon kaj muzikon, dum mallonga tempo atingas ĉiujn kaj antaŭas ilin en la muzika arto...“ Tiel la tute lakona maneskribita biografio de Kukuzel priskribas la rapidan progreson de la talenta junulo, kiu baldaŭ ricevas la altan rekonon de „unua imperatoria kantisto“, „plej eminenta magistro de la muzikmagistroj“ en Bizanco.

Nome li estas komisiita fari la necesan reformon. Li kreas novan notsribon, kiun oni nomis „Kukuzela“. Samtempe kreas multajn novajn verkojn. Centran lokon en la riĉega verkaro de la fama himnokomponisto okupas „Elegio pri la bulgarino“ — dediĉita al lia patrino kaj kreita laŭ motivoj de ŝia malĝoja plorado. Kukuzel nomas „bulgara“ kaj „bulgaraj“ ankaŭ aliajn el siaj verkoj por substreki la nacian devenon kaj ke en ili estas uzitaj bulgaraj popularaj motivoj. Paralele kun la reformado kaj unueco de la orienta preĝkantado Kukuzel organizas lernejojn por preĝkantistoj

kaj instruistoj-teoriuloj. Por plej rapida kaj efika instruado de la junaj muzikistoj, kiuj transportas la reformon en ĉiujn angulojn de la ortodoksa Oriento, li kreas vicon da teoriaj verkoj, didaktikajn ekzercojn kaj skemojn. Ĝis hodiaŭ ili estas objekto de esploro fare de plej eminentaj sciencistoj. Kompare kun la muziko de Okcidenta Eŭropo dum la sama tempo, kies disvolviĝo estas plejparte en la sfero de la polifonio, la orienta preĝkantado el la tempo de Kukuzel distingiĝas per pli granda voĉa diapazono, pli riĉa melodio, dinamika, ritma, metrika kaj tembra varieco. La melodieco ricevas pli grandan esprimopovon kaj plastecon — trajtoj, kiuj fariĝas devigaj por la muziko de la Renesanco.

Alte taksataj jam dumvive de la granda kreanto, liaj verkoj reskribiĝas kaj disvastiĝas en proksimaj kaj malproksimaj landoj, konservante en ĉiuj okazoj la noton „de majstro **Joan Kukuzel**“. Oni malkovras ilin nun en la bibliotekoj de Konstantinopolo kaj Tesaloniko, Aton, Ateno, Sinaj, Herusalemo, Vatikano, Parizo, Munkeno, Hispanio, ktp.

Kreita antaŭ tiom da jarcentoj, la verkoj de Kukuzel, simile al la bizancaj kaj bulgaraj ikonoj el tiu epoko, ne perdis sian belartan signifon kaj forton. Ili ankaŭ nun estas plenumataj en la mondo kaj vekas admiron kaj ĝojon.

Hodiaŭ la heredaĵo de la granda kantokreanto estas riĉa fonto de la alta, la humana, la bela. Pere de ĝi ni transportiĝas en la spiritan mondon de niaj malproksimaj praaŭoj, por kiuj la amo al la homo, al la bulgara madono — la patrino, staras super ĉio kaj estas pli forta ol ĉio. Ĉar ŝi, la bulgara patrino, ne nur kreas, sed ankaŭ rekreas nin multajn kaj multajn fojojn...

POR VIA JARKOLEKTO

La administracio de „Bulgara Esperantisto“ disponas pri limigita kvanto de pasintjaraj numeroj de „BE“. Por kompletigi vian jarkolekton, skribu preslitere vian adreson kaj ni senpage sendos al vi la deziritajn numerojn.

Nova grupo de bk-kolektantoj deziras kontaktojn tutmonde. Skribu al: Kulturbund der DDR, Kreisleitung, 2300 Stralsund, Alter Markt 16, GDR.

JUBILEO DE SOVETA VETERANO

La bulgara esperantistaro delonge konas nian sovetan amikon S. N. Podkaminer — vicprezidanto de la Asocio de Sovetaj Esperantistoj, membro de la Internacia Komitato de Mondpaca Esperantista Movado, dekorita per la honorinsigno de MEM. Li agadas en la vicoj de la leningradaj e-istoj kaj estas tre populara ne nur inter ili, sed ankaŭ en tuta Sovetunio kaj eksterlande.

K-do Podkaminer naskiĝis la 11an de februaro 1901 en familio de profesia muzikisto. Nature, la gepatroj deziris vidi sian filon en la sama profesio, pro kio la knabo vizitadis muzikan konservatorion. Sed en la universitato li jam elektis al si teknikan fakon kaj fariĝis fervoja inĝeniero. Poste li transiris al alia inĝeniera fako kaj eklaboris en la sfero de la aerotrafiko. En tiu scienca branĉo li registris multajn sukcesojn kaj laboris kiel docento en Leningrada Aertrafika Altlernejo. Poste oni elektis lin rektoro de tiu renoma altlernejo.

Sed komenciĝis la agresmilito de faŝisma Germanio kontraŭ Sovetio. La prosperanta sciencisto Podkaminer direktiĝis al la fronto por defendi sian amatan Leningradon kaj la sovetan patrolandon. Dum la heroecaj 900 tagoj da sieĝo de Leningrado li restis en la unuaj vicoj de la rezistantoj kontraŭ la bruna pesto.

Post la kapitulaco de Hitlera Germanio kolonelo S. N. Podkaminer kune kun grupo de aliaj sovetaj oficiroj, plenumantaj kulturajn taskojn, restis en la soveta okupacia zono por helpadi al la germana loĝantaro krei normalajn vivkondiĉojn.

Li agadis sur la kultura fronto kaj kunlaboris por elradiko de la reakcia ideologio de hitlerismo. Pro sia nobla laboro la konsekvenca humanisto kaj internaciisto Podkaminer estas tre konata kaj estimata en la Germana Demokratia Respubliko. Li estas kavaliro de la germana medalo Johannes Becher (Beher) en oro.

Post sia reveno el Germanio Podkaminer denove okupiĝis pri sia antaŭmilita profesia agado en la kadro de la Aertrafika Altlernejo, kie li laboris ĝis sia emiriĝo.

Kie ajn troviĝis nia amiko, kiajn ajn taskojn li plenumadis, neniam li neglektis la laboron por E-o. La Internacian Lingvon li ellernis jam kiel studento en 1920 j. kaj en daŭro de pli ol sesdek jaroj aktivis kiel ĝia apostolo. Dank'al sia fervoreco li ricevis altajn respondecojn en la soveta E-movado. Podkaminer partoprenis la laboron de la fonda kongreso de Sovetrespublikara Esperantista

Unuiĝo (SEU) en 1921 j. estis sekretario de la Loka Kongresa Komitato de la sesa kongreso de Sennacieca Asocio Tutmonda (SAT) en Leningrado (1926), kunlaboris al la plej elstaraj gvidantoj de SEU kaj faris multon por la bono de la soveta kaj internacia E-movado. Precipe gravan kontribuon li havas en la organizado kaj direktado de la internacia laborista E-movado.

Post la periodo de personeckulto, kiu mistrafis ankaŭ la esperantistan movadon, Podkaminer faris grandan pioniran laboron por reaktivigo de la ekzistantaj fortoj kaj por edukado de novaj E-generacioj. Li gvidis kursojn de E-o en la plej grandaj kulturpalacoj de Leningrado. La novaj kadroj kune kun la veteranoj starigis la demandojn pri kreo de la konata Komisiono por Internaciaj Ligoj de Sovetaj E-istoj de la Unuiĝo de Sovetaj Amikecsocietoj kun Eksterlando (SSOD). La farita de tiu komisiono laboro, sub la prezidanteco de prof. E. A. Bokarjov kaj kun la plej energia subteno de S. N. Podkaminer rezultigis fine la kreon de Asocio de Sovetaj E-istoj (1979).

Samtempe Podkaminer agadis fruktdone ankaŭ en la vicoj de Mondpaca E-Movado. Kiel membro de ĝia Internacia Komitato kaj dum certa periodo kiel ĝia vicprezidanto li gvidis la laboron de la soveta MEM-sekcio. Al Podkaminer apartenas multaj artikoloj en la eldonataj de MEM kaj de la soveta MEM-sekcio revuoj, bultenoj kaj broŝuroj. Krome li verkis artikolojn pri MEM kaj E-o en gravaj sovetaj neesperantistaj eldonaĵoj kaj radio-programoj.

En sia tuteca E-agado S.N. Podkaminer reliefigis kiel bonega praktikulo kaj teoriulo de la moderna E-movado kaj MEM. Nun kiel vicprezidanto de ASE li respondecas konkrete pri la soveta MEM-sekcio.

K-do Podkaminer jam kelkfoje vizitis Bulgarijon kaj konas persone multajn el niaj aktivuloj. Li ĉeestis landajn kongresojn de BEA, aktivis en la kunsidoj de ĝeneralaj MEM-konferencoj, okazintaj en nia lando. Lia plej freŝa vizito en Bulgario estis dum la tagoj de la 63a UK de E-o en Varno. Post ĝi li faris grandan ekskurson tra Bulgario kompanie kun e-istoj el aliaj landoj.

Ni alte aprezas la amikan rilaton de S.N. Podkaminer al la bulgara esperantistaro, al nia lando kaj popolo. Al tiu senlaca kaj energia E-o veterano ni bondeziras fortikan sanon kaj daŭran aktivecon!

Nikola ALEKSIEV,
honora prezidanto de MEM

ALEKSANDRO ZILBERNIK

Aleksandro Lejbovič Zilbernik naskiĝis en Viekšniai, distrikto de Vilno (Litovio) kaj mortis la 25an de marto 1906 en Varsovio. Lia patro, Lejb Sah, estis libera rabeno en la hebrea komunumo. La familian nomon Zilbernik Aleksandro ricevis pro jena okazintaĵo: por eviti militservon liaj gepatroj turnis sin al la seninfanaj gepatroj Silberfenig kun la peto adopti la infanon (laŭ la rusaj leĝoj sola filo en la familio estas libera je milit-servo). La rusa oficisto enskribis la infanon Sah erare: anstataŭ Silberfenig Silbernik. La infano lernis en Ješivot (Supera rabena lernejo) kaj per meminstruado lernis rusan kaj germanan lingvojn. Li edziĝis kun la filino Hadasa de la riĉa kaj honesta familio Bjeloh en Bialistok, Rusujo, poste translokiĝis en urbon Kovno kaj kune kun J. Sčeranskij fondis fabrikon de sapo, kiun ili gvidis 47 jarojn en plena harmonio.

Zilbernik havis kvar filojn kaj kvin filinojn. La plej juna filino Klara (6 okt. 1863 — 6 dec. 1924) edziniĝis la 9an de aŭgusto 1887 al L. L. Zamenhof. Zamenhof finis la kreadon de E-o en 1885 kaj dum du jaroj vane serĉis eldoniston. Neniu volis aŭdi pri E-o, ĉar jam ekzistis la lingvo Volapük, neniu volis riski eĉ malgrandan monsumeton por eldoni la unuajn malgrandajn broŝuretojn de E-o en la rusa, pola, franca, germana, angla lingvoj. Zilbernik donis 10 000 rublojn, la duonon el kiuj Zamenhof elspezis por la presado de E-lernolibroj kaj ilia senpaga dissendado al redakcioj, lernejoj, profesoroj, kuracistoj, diversaj societoj, por multaj anoncoj en gazetoj ktp.

En 1888 Marko Zamenhof, patro de L. Zamenhof, estis minacita de granda puno. En 1887 li, kiel cenzuristo, permesis aperon de libro, kiu trapasis ĉiujn cenzurejojn kaj neniun judan cenzuriston volis doni prespermeson por ĝi. Tio estis judlingva publikaĵo „Der jidiŝer veke“ (La juda vekanto), eldonata en Odeso en 1887 sub la redakto de M. L. Lilienblum. Aperis tie poemo „A ŝtajn fin haron“ (Stono el koro), en kiu per akra satira tono estis esperimita protesto kontraŭ la pogromoj. M. Zamenhof estis la sola juda cenzuristo, kiu kuraĝis doni prespermeson. Bedaŭrinde, troviĝis iu, kiu sekrete lin kalumniis antaŭ la supera cenzurejo. La afero estis transdonita al Nikander Vasiljevič Zusmen en S. Peterburg.

D-ro J. Frenkel en n-ro 199—200 de la jaro 1888 en „Hacéfira“ (Matenruĝo) aperigis artikolon pri vinberujo kaj vinberoj, en n-ro 202 daŭrigon — pri la vino, pri ĝia efiko sur

la homan korpon. La aŭtoro permesas, ke oni trinku ĉiutage maksimume kvaronlitron da vino kaj ne per unu fojo, sed per tri fojoj, trione dividitan. La artikolo finiĝis jene:

„Pli ol tiu kvanto difektas kaj malsanigas. Prave ni diru: morto kaj vivo dependas de la alkoholo. Troigo kaŭzas diversaj malsanojn. Daŭra trinkado de vino forigas de la cerbo de l'homo iom post iom la intelektajn civilitajn kapablojn kaj kelkfoje kaŭzas frenezon kaj perdon de la tuta prudento.“

La kontrolisto Zusmen en S. Peterburg estis drinkemulo, malbonintenta. Li supozis aludon. Evidente li sciis, kian kutimon kaj kian guston havas la caro. Tiu artikolo vekis ĉe Zusmen flaman koleron. Li akuzis la ĉiam lojalan cenzuriston M. Zamenhof, ke Frenkel per la fino de la nomita artikolo ofendis la caron. Kion ni hodiaŭ pensu, se tiu ordinara higiena informo estis ofendo al la caro! Strangaj motivoj kaŝiĝis malantaŭ tiu ĉi absurdaĵo.

Por eviti la punon, L. Zamenhof donis al sia patro la restintajn 5000 rublojn kaj mem restis sen mono. Zamenhof savis la patron, sed mem ruinigis por ĉiam. M. Zamenhof veturis al S. Peterburg kaj donis la monon al la cenzuristo Zusmen kaj al aliaj altaj oficistoj.

La enspezoj de L. Zamenhof estis tiel malgrandaj, ke ili kovradis nur parton de liaj plej necesaj kaj plej modestaj elspezoj. Al Zilbernik subtenis sian bofilon dum 15 jaroj. Li kredis al la ideo de sia bofilo. Tuj post la apero de E-o (26 julio 1887) li ellernis ĝin perfekte malgraŭ sia neĵuna aĝo, fariĝis fervora e-isto kaj korespondis kun alilandaj s-anoj. Zilbernik subtenadis la bofilon ne nur materiale, sed ankaŭ morale. Li ĉiam konsolis lin, kiam la esperoj de tiu ĉi lasta komencis malgrandiĝi. Zilbernik havis grandan amon kaj intereson al la afero de E-o, kaj la lastaj libroj kaj gazetoj, kiujn oni trovis sur lia skribotablo post la morto, estis Esperantaj.

A. Zakrzewski en „Historio de Esperanto“, 1913 j. kaj E. Privat en „Vivo de Zamenhof“, 1920 j., biografioj de Zamenhof, eĉ per unu vorto ne menciis la nomon de Al. Zilbernik.

Aleksandro Zilbernik estis la unua mecenato de E-o. Al li la e-isto ŝuldas tion, ke E-o povis trapasi la plej malfacilajn jarojn de sia ekzisto.

En Pazu gativ (Pazu-strato) en Kovno (nuna Kaunas) Aleksandro Zilbernik havis domon. En 1925 j. Pazu gativ estis nomita Zamenhofo gativ (Zamenhof-strato). En 1941 j. la germanaj hitleranoj, okupinte Litovion, sovaĝbeste detruis la stratabulon.

КОЙТО НЕ РАБОТИ, НЕ ТРЯБВА
ДА ЯДЕ

Българска народна приказка

В едно село расла хубава мома Богданка. Тя била едничка на баща и майка и била много галена. Майка ѝ шетала, а Богданка нищо не похващала.

Почнали да я искат за снаха. Майка ѝ на всички казвала:

— Наша Богданка не е научена да работи... Тя е галена.

Щом чуели това, всички си отивали.

Веднъж дошъл един старец и казал:
— Чух, че имате хубава мома. Дойдох да я взема за снаха.

Майката и нему отговорила:

— Наша Богданка е много галена. Тя нищо не знае да работи.

— Бива! — рекъл старецът. — У нас никой никого не кара да работи. Който не иска, не работи.

Скоро направили сватбата.

Старецът имал трима сина и още две по-стари снахи.

На другия ден след сватбата всички се заловили за работа. Невестата седяла пременена и нищо не похващала.

Събрали се на обяд всички. Невестата седнала настрана и чакала да я поканят. Донесли другите снахи гозбата. Сложили пред свекъра си голяма пита хляб. Той взел питата и я разчупил пред тези, които били на трапезата.

— А на невестата? — рекла бабата.

— Тя не е гладна — отвърнал той. — Когато човек не работи, не огладнява.

След обяд пак започнали работа. Невестата седяла и нищо не похващала.

Събрали се да вечерят. Старецът взел питата и я разчупил пак на толкова парчета, колкото души били на трапезата.

— А на Богданка? — запитала бабата.

— Тя не е гладна — отговорил старецът. — Който не работи, не огладнява.

Вечеряли, поприказвали кой какво ще работи на другия ден, легнали и заспали.

Легнала и булката. Но гладни очи заспиват ли? Тя едвам дочакала да се съмне. Станала тихичко, измила си очите, издоила кравите, изкарала телците. Станали и другите. Когато видели що е направила невестата, спогледали се и се усмихнали.

На обяд невестата сложила трапезата и седнала наред с другите.

Старецът разчупил питата, подал най-голямото парче на невестата и рекъл:

— Ти, невесто, днес работи най-много от
(Следва на стр. 16)

KIU NE LABORAS, TIU NE RAJTAS
MANĜI

Bulgara popola fabelo

En iu vilaĝo kreskis bela junulino Bogdanka. Si estis ununura al siaj gepatroj kaj tre dorlotata. Sia patrino mastumis kaj Bogdanka laboris nenion.

Oni komencis postuli ŝin por bofilino. Sia patrino al ĉiuj diradis:

— Nia Bogdanka ne estas al kutimiginta labori... Si estas dorlotata.

Aŭdinte tion, ĉiuj tuj foriris.

Foje venis maljunulo kaj diris:

— Mi aŭdis, ke vi havas belan junulinon, kaj venis por preni ŝin kiel bofilinon.

La patrino ankaŭ al li respondis:

— Nia Bogdanka estas tre dorlotita. Si nenion scipovas labori.

— Bone! — diris la maljunulo. — Ni nenion igas labori. Kiu ne volas, tiu ne laboras.

Baldaŭ oni faris la edziĝfeston.

La maljunulo havis tri filojn kaj ankoraŭ du pli aĝajn bofilinojn.

La tagon post la edziĝfesto ĉiuj komencis labori. La novedzino sidis feste vestita kaj nenion laboris.

Kolektiĝis por tagmanĝo ĉiuj. La novedzino sidigis iom flanke kaj ekatendis esti invitita. La aliaj bofilinoj alportis la manĝaĵon. Antaŭ sian bopatron ili metis grandan platpanon. Li prenis la panon kaj dispecigis ĝin antaŭ tiuj, kiuj estis ĉe la manĝotablo.

— Kaj al la nova bofilino? — diris la avino.

— Si ne estas malsata, — respondis li. — Kiam oni ne laboras, oni ne malsatas.

Posttagmeze ĉiuj denove komencis labori. La novedzino sidis kaj nenion laboris.

Oni kolektiĝis por vespermanĝo. La maljunulo prenis platpanon kaj denove dispecigis ĝin je tiom da pecoj, kiom da homoj sidis ĉe la manĝotablo.

— Kaj al Bogdanka? — demandis la avino.

— Si ne estas malsata, — respondis la maljunulo. — Kiu ne laboras, tiu ne malsatas.

Oni vespermanĝis, parolis iom pri la laboro de ĉiu dum la sekva tago, enlitigis kaj ekdormis.

Enlitigis ankaŭ la novedzino. Tamen ĉu malsataj okuloj povas ekdormi? Si apenaŭ ĝisatendis la tagiĝon. Ellitigis ŝi senbrue, lavis sian vizaĝon, melkis la bovinon, elirigis la bovidojn el la stalo. Ellitigis ankaŭ la ceteraj. Kiam ili vidis, kion estas farinta la novedzino, ili interrigardis sin kaj ekridetis.

(Daŭrigo sur p. 16)

LA REVOJ HOMAJ

El la aerodromoj vastaj
de niaj koroj
preskaŭ ĉiumomente
ekflugas
hastaj,
elsuferitaj
kaj puraj
la revoj niaj
homaj.

Ili estas pilotoj
plej ardaj.
Ĉiu el ni
de amo kaj rev'
estas kaptita.
Funkcias la revoj
kun rapideco granda,
kondukas supren
kaj antaŭen
subite.

Kaj trovas ili
la plej ĝustan direkton
al la estonto
kun la tagoj helaj.
Nin rave logas la revoj
kiel bluokuloj
de amikino
fidela.

Per ili ĉiu
ĉion povas fari:
al la senfino strebante
trovi novan stelon,
malkovri planedon,
ĉirkaŭrigardi
la oceanon
ĉielan.

La vojo de l'revoj
estas senlima.
Por ili ne necesas
vizo kaj pasporto.
Pilotoj kosmaj
estas la revoj.
Kun ili homo pasas
fiera kaj forta.

Se en la brusto nia
revoj ekfloras,
al la muskoloj niaj
povon ili donas.
Ŝargojn ili havas.
neĉerpeblan.
Post ilin,
amikoj,
nur post ilin!

El la bulgara: Kunĉo VĀLEV

(От стр. 15)

всички. Ето и на тебе от питата.

Изминали седмица-две. Невестата по цял ден шетала. На третата седмица майка ѝ и татко ѝ дошли на гости. Всички излезли на двора да ги посрещнат.

Невестата припнала най-напред. Тя отворила портите и бързо извикала:

— Мамол! . . . Тател! . . . Слизайте по-скоро от колата и се хващайте на работа! Тука не е като у нас. . . Тука който не работи, не му дават да яде!

INTERKONATIĜA

Ĝis tiu ĉi vespero mi ne konis vin,
sed scias mi, ke ie vi ekzistas,
ke pensas, agas kiel mi kaj amas min,
ĉar estas ambaŭ ni esperantistoj.
Mi scias, kiel forte batas via kor' —
por nia idealo vi persistas;
vi scias: estas moko, ĝojo kaj dolor,
ĉar estas ambaŭ ni esperantistoj.
Kun ĝojo premus vian manon mia man',
neniam estus solaj ni kaj tristaj.
Por ĉiam estu fratoj ni, samidean',
ĉar estas ambaŭ ni esperantistoj.
Por mi, por vi, por ĉiuj homoj estu pac'!
Ne povas kvereliĝi nin la militistoj!
Ni iru kune kontraŭ la militminac',
ĉar estas ambaŭ ni esperantistoj.
De tiu ĉi vespero ne nur unu foj',
sed ĉiam estu vi por mi ĵuĝisto,
kaj kune marŝu ni sur nia hela voj',
ĉar estas ambaŭ ni esperantistoj.

GRANDA PERDO POR LA E-MOVADO



En Smoljan forpasis en sia 37-jara aĝo nia sindona kaj fervora multjara E-aganto

STEFAN PAVLOV

sekretario de la DE de BEA en Smoljan kaj membro de la CE.
Niajn profundajn kondolencojn!

(daŭrigo de p. 15)

Tagmeze la novedzino aranĝis la manĝotablon kaj sidigis vice kun la ceteraj. La maljunulo dispecigis panon, donis la plej grandan pecon al ŝi kaj diris:

— Vi, bofilino, hodiaŭ laboris plej multe el ĉiuj. Jen estas peco da pano ankaŭ por vi.

Pasis unu, du semajnoj. La novedzino tutan tagon mastrumis. La trian semajnon ŝiaj gepatroj venis gaste. Ĉiuj eliris en la korton por renkonti ilin.

La junedzino kuris la unua. Ŝi malfermis la pordegon kaj rapide ekkriis:

— Panjo! . . . Paĉjo! . . . Malsupreniru rapide de la veturilo kaj komencu laboron! Tie ĉi ne estas kiel ĉe ni. . . Tie ĉi kiu ne laboras, al tiu oni ne donas manĝi.

Esperantigis: Marin BĀCEV

ALTNIVELA POEMKOLEKTO

Prenante enmane la novan poemaron „Gardu la pacon!“ de nia granda poeto-esperantisto Asen Grigorov, ni havas la senton, ke ni renkontas veran, fidelan amikon. Ĉar ĉiuj esprimataj en ĝi sentoj ŝprucas el lia sentema koro, el lia klara menso, el lia civitana pozicio de batalanto kaj komunisto.

La titolo mem „Gardu la pacon!“ memorigas la plej gravan celon de nia nuntempa vivo: gardi la pacon, batali por paco kaj amikeco inter ĉiuj popoloj sur la tero.

Sed ne nur pri pacbatalo kantas la poeto. En sia poezio li manifestas ankaŭ sian grandan amon al la kara patrolando. Liaj versaĵoj „Mia patrolando“, „Nokto apud Sofio“ kaj aparte la beleaga muzikoriĉa „Vitoŝa-balado“ pentras konvinke la belecon de Bulgario. Kian belan bildon, kian muzikon ekzemple en la jenaj linioj:

„Atingante la ĉielon, spegulante ĝian helon
ĝi rakontas la fabelon sen komenco kaj sen fin!“

Per similaj sentoplenaj kaj muzikriĉaj versoj la poeto priskribas ankaŭ la senmortajn batalantojn por libero kaj feliĉo de la popolo:

„Fluis la skarlata sango, ĝemis la bulgara lando,
sed ne cedis la luktanto, daŭris pafoj, glava tint!“

Kun ne malpli granda amo la poeto priantas la belecon kaj la vivon de aliaj frataj landoj. Se vi legus pri liaj teneraj travivaĵoj en Szeged kaj Gyula, la poemojn „Forpasis Kalocsay“ kaj „Figyelen!“, vi komprenus la profundajn sentojn de la aŭtoro al la frata lando Hungario.

Ankoraŭ pli proksima al sia koro sentas la poeto Sovetunion, aparte Uzbekujon, kiun li vizitis dum la Unua Uzbekistana E-tendaro. Per la tri emociplenaj poemoj — „Nokto en Cimĝan“, „Tjanĝ Sanĝ“ kaj „Balado de rivero Catkai“, li pentras la grandiozan naturon de Uzbekujo kaj la gloran liberigan batalon de la uzbeka popolo.

Arda adepto de Esperanto, Grigorov priantas ankaŭ ĝin per kelkaj mojstre verkitaĵoj poemoj.

En la dua parto de la poemkolekto — malgranda antologio — oni donas lokon al kelkdeko da tradukaĵoj el la bulgara folkloro, klasika kaj nuntempa poezioj.

Per siaj plej belaj verkoj estas prezentitaj la klasikuloj Ĥristo Botev, Ivan Vazov, Pejo Javorov, Dimĉo Debeljanov k.a. Lokon trovis ankaŭ versaĵoj de Ĥristo Smirnenski, Nikola Vapcarov, Veselin Ĥanĉev, Georgi Gagarov, Nikolaj Zidarov, Vätju Rakovski k.a., ankaŭ la poetinoj Elisaveta Bagrjana kaj Blaga Dimitrova. Tiamaniere Grigorov donis eblecon al la fremdlandaj e-istoj konatiĝi kun plej valoraj verkoj de la bulgara poezio.

La stilo kaj lingvaĵo de la poemkolekto „Gardu la pacon!“ estas riĉaj, altnivalaj. Aparte impresas la belsonaj kaj trafaj rimoj, la senriproĉa kaj sensumbala ritmo, kiu donas la muzikan linion de la versoj.

Recanzante la poemkolekton, ni nepre devas mencii la postparolon verkitan de Vanelin Mitev. Ĝi entenas analizon de la verkaro de Asen Grigorov kaj donas kompletan literaturan portreton de la poeto.

Ljuba Bojaĝieva

„Longe mi nenon sendis al „Bulgara Esperantisto“. Sed kun bulgaroj nin ligas malnova amikeco dank“ al interesa korespondado kun la honora membro de nia internacia klubo Asen Grigorov, kun nia amikino Stefka Miĥajlova el Sumen k.a.

Antaŭ nelonge nia internacia klubo sendis donacon al la E-klubo en Sumen lige kun ĝia 75-jara jubileo. Ankaŭ gratulleteron ni sendis. Mi estas kontenta.

Ĉio supremenciita estas skribita sincere, ĉar kartveloj kaj bulgaroj longe havis interesan historion. Sufiĉas nur rememorigi, ke en la monaĥejo, de Baĥkoro, en la XII jc. laboris nia kartvela filozofo Ivan Petrici. Pri tio mi povas prepari artikolon por via gazeto. Ĉu vi ne povas sendi al ni bildkarton de tiu monaĥejo?



Nian internacian klubon „Gagarin“ vizitas tute juna komencanta esperantistino Irma. Sia nomo kartvelingve signifas „cervo“. Si estas belulino de nia klubo kaj forte amas E-on. Irma deklamas, kantas, kolektas bildkartojn. Kiam ni demandis, kion ŝi volus ricevi de siaj amikoj, ŝi respondis rapide kaj kuraĝe: „Ĉion, kion oni ekvolos!“

Mia peto al vi estas aperigi en „Bulgara Esperantisto“ ŝian foton kaj deziron havi geamikojn-samagulojn. Ni anticipe dankas vin!

Kun sinceraj bondeziroj

Kristina KAĜAJA

gvidantino de E-rondeto ĉe
Palaco de Pioniroj en u. Kutaisi,
USSR

TALENTA KNABO

En u. Krasnodar loĝas la 6-jara knabo Serĉjo Tevjakov. Li estas talenta ŝakludanto. La ŝakon Serĉjo ludas el sia tuta koro.

La monda ŝakĉampiono Anatolij Karpov renkontiĝis en aprilo kun la malgranda talenta ŝakludanto. Post la konatiĝo Karpov diris: „Serĉjo Tevjakov estas la plej interesa ŝakludanto. Mi tutkore bondeziras al li dum plej mallonga tempo fariĝi grandmajstro kaj ŝakĉampiono!“

Aleksej Nikulin

„GARDU LA PACONI!“ — poemaro de Asen Grigorov. Eldonejo de Hungara Esperanto-Asocio, 1980 j., 120 paĝoj.

URĜAI

Malnova esperantisto kun sia edzino volas viziti Leningradon dum blankaj noktoj. Vizitado interŝanga. Adreso: Metodi Garev, bul. „Ĥr. Botev“ 97, BG-1303 SOFIA, Bulgario.



Nia „Verda Rosmaro“ Kiril Kalčev el Lovč satas bani sin vintre en la glaciakvoj de r. Osam.

KOMENCU PER HARDIGADO

Al ĉiuj estas konata la teoremo de Pitagoro. Sed ĉu vi scias, ke la granda sciencisto partoprenis en la olimpikaj ludoj? Kaj ke li unua disvastigis en Antikva Grekujo la kuracadon per ma.avarma akvo?

La patro de la medicino Hipokrato rekomendis la banadon en bankuvo, la surversadon kaj la frotadon kiel forte efikajn terapiojn rimedojn. Lia disĉiplo, la fama kuracisto Asklepiado, konsideris la dieton kaj la gimnastikon, la ludojn kaj la promenadojn, la muzikon kaj la deklamadon kiel fundamentajn resanigmetodojn. Sed la plej ĉefa rimedo, liaopinie, estas la hardigado. Dank' al Asklepiado la romoj komencis kun entuziasmo uzi la malvarman akvon por kuracaj kaj higienaj celoj. Antonio Muzo, liberigita sklavo kaj poste kuracisto de imperiestro Aŭgusto, famigis per tio, ke li fortikigis per malvarmaj akvaj procedoj Cezaron, kiu havis delikatan sanon. Per la helpo de la malvarmaj akvaj procedoj li resanigis la roman poeton Horacio.

La granda rusa regimentestro Suvorov donis al la hardigado tre altan pritakson. Li ĉiutage surverŝis sin per du lignositeloj da malvarma akvo. Eĉ kiam frostis, li portis nek peltan mantelon, nek flanelon kaj ledejn gantojn.

Laŭ informoj de la amikoj de Puŝkin, la granda rusa poeto, preskaŭ neniam malsanis, ĉar dum sia tuta vivo hardigis sin. L.S. Puŝkin, priskribanta la vivon de sia genia frato en vilaĝo Mihajlovskoe, notis: „Dum la vintro, post vekigo, li banis sin en bankuvo, en kiu naĝis glacipecetoj, kaj dum la somero li direktigis al la proksima montara rivero.“

Se vi jam estas decidintaj sekvi la ekzemplon de tiuj grandaj kaj saĝaj homoj, kiel komenco faru tiel, ke via vekhorloĝo sonoru 15 minutojn pli frue ol via kutima vekigo. Ĉe malfermita fenestro vi faru fizikajn korpekzercojn, post kio vi elpaŝu al frotado. La temperaturo en la ejo, kie vi aplikas la hardigprocedojn, devas esti 18–20° laŭ Celzjus. En unu mano vi prenu malsekigitan spongon aŭ tukon kaj per ĝi komencu froti la tutan korpon. Poste vi frotu la korpon per seka viŝtuko ĝis sekigo kaj tiam vestiĝu.

Post monato vi alpaŝu al alia speco de la hardigado — la surversado per malvarma akvo.

El la rusa: Kiril Kalčev

HUMURAJOJ

- Ĉu morgaŭ vi pruntedonos al mi 100 levojn?
- Kial vi demandas pri tio hodiaŭ?
- Ĉar vi ĉiam diras al mi, „kial vi ne venis hieraŭ!“
- El la du filoj de Gefri nenio bona ricevigis — unu ludas, alia ŝtelas.
- Kaj la tria?
- Li faras kaj la unuan, kaj la duan — komponisto estas.

Majdiligenta studento ĉe ekzameno respondas malbone.

- Ĉu vi almenaŭ povas difini la vorton „kreado“?
- demandas kolera la profesoro.
- Kreado... kreado... — ekbalbutas la studento, — tio eble signifas fari ion el nenio.
- Jes, ĝuste dirite, tio signifas fari el vi kuraciston, kolego.

- Tiu ĉi Kovalska estas tre malbona dommastrino.
- De kie vi scias?
- De mia propra sperto. Hierau mi petis ŝin pruntedoni al mi sukeron, sed ŝi ne havis. Hodiaŭ matene la samo ripetigis pri la lakto. Nun mi iris al ŝi por cepo, kaj imagu, montriĝis ke ŝi havas eĉ ne unu bulbon.

- Jam tutan jaron mi ne parolis kun mia edzino — diras iu al siaj amikoj.
- Ĉu vi ne estas ofenditaj unu al la alia?
- Ne. Simple mi ne deziras interrompi ŝin.

- Mi ne povas elpensi kion aĉeti por la naskiĝtago de mia edzino.
- Kial vi ne demandas ŝin?
- Ho, ne! Tio da mono mi ne havas.

La dommastrino eniras hejmen kun plenplenaj sakoj. La edzo apenaŭ jetas al ŝi rigardon kaj plue legas ĵurnalon.

- Jam vi estis multe pli atentema al mi, — rimarkigas ŝi.
- Sed, kara mia, — respondas neglekte li, — kiu maltrankviligas ne preterlasi la vagonaron, se li jam estas en ĝi?

SOLVO DE LA VORTENIGMO

en n-ro 7-8/1980

